

Wocak (3)

2652080

ST. PRZYBYSZEWSKI

(Stanislav Pšibyševski)

449

# LA NEĜO

Kvarakta dramo


El pola lingvo tradukis

Tadeo Ficovski

Marian Grodzki  
Toruń, Bibli. nr: 205

VARSOVIO 1912

Eldono de Jan Günther



MS6141

Presejo L. Bogusławski, Świetokrzyska 11.

D 200/18

ba nego.

*Al „POLA ESPERANTISTO“, la glorinda  
pioniro de esperanta afero en Pollando — sian  
modestan laboraĵon dediĉas*

*LA TRADUKINTO.*

PERSONOJ:

TADEO (karese — TADZJO).

BRONKA, lia edzino.

EVA, ŝia amikino.

KAZIMIRO, frato de TADEO (karese — KAZIO),

MAKRINO.

LAKEO.

AKTO I.

SCENO I.

KAZIMIRO — BRONKA.

*La rigardanto vidas luksan mangoĉambron, el kiu tra grandaj, altaj fenestroj kaj tra vitra vintra plantejo oni vidas nudajn, kovritajn per prujno arbojn en ĝardeno kaj dense falantajn neĝerojn. En angulo staras granda, malnovtempa kameno, apude pinlignaj ŝtipoj, kiujn Kazimiro ofte enmetadas nervamove en la fajron. Bronka staras ĉe la fenestro, malkviete rigardante la neĝan venton.*

KAZIMIRO. Kial ci tiel malkvietiĝas? Ne estu do infano. Kion ci timas?

BRONKA. Sed, pro Dio, Kazjo, ĉu ci ne vidas, kiel neĝblovas? Preskaŭ tutan tagon neĝas kaj neĝas. Formiĝis jam tutaj montetoj da neĝo. Tie post la urbo la vojo estas sen arboj preskaŭ je unu kilometro. Nun se erarus la veturigisto? La glitveturilo renversigis en kavon...

KAZIMIRO (*interrompas ŝin*). Nu, kaj kio do? Tadeo falos en kavon. Estas ja mole.

BRONKA. Ah, kia ci estas malbela!

KAZIMIRO. Nu, ne koleru. Sed mi efektive konsideras vin, kiel du infanojn. Via interrilito estas malofta anomalio! Jam de unu jaro vi estas geedzoj, kaj vi ludas per tiaj sentimentalaĵoj, kvazaŭ vi estas hieraŭ interkoniĝintaj.

BRONKA. Sed ĝuste tio-ĉi tiel beligas nian vivon.

KAZIMIRO. Certe, certe, sed diru al mi, kara Bronka, kiom da amleteroj ci ricevis de cia Tadeo dum tiu-ĉi unu semajno, kiam li forestas de la hejmo.

BRONKA. Ah, se ci scius, kian belan leteron li skribis al mi! Se ci scius, kiel mi amas liajn leterojn. Tiel belajn vortojn neniu scias diri.

KAZIMIRO. Nu — la vortoj ne multe kostas. Sed Tadeo vere cin amas. (*enpense*) Jes, li tre amas cin. Mi envias al vi vian amon kaj vian feliĉon. (*post momento*) Mi baldaŭ tute malvigliĝos ĉe vi. Ĉiam pli ofte mi sonĝas la sentimentalajn idiliojn pri iu anguleto, kie apud amata, karesata kaj karesanta virino mi povus libere laboradi. Lacigis min kaj enuigis tiu eterna vagado tra la tuta mondo. Cetere ĉio-ĉi estas blago. Artistaj impresoj, muzeoj, teatro, cirko, Italujo, Parizo — ĉio blago, blago. Nur ĉiam pligrandiĝas la enuo. Ĉie estas la samo, kaj la

homo vagas tiel de unu angulo en la alian kun la sama senĉesa enuo...

BRONKA. Kazjo, Kazjo, kia malgaja ci estas. Tian senliman malgajon mi neniam ĝis nun vidis.

KAZIMIRO. Jes.

BRONKA. Kaj se ci enamiĝus, Kazjo?

KAZIMIRO. Nur en ci mi povus. Cetere mi jam estas proksima al tio.

BRONKA (*serce*). Eh, ci malspritulo, kion ci farus kun tia simpla knabino, kiel mi! Ne por ci estas tia nobeleta simplulino.

KAZIMIRO (*ironie*). Kaj jen ĝuste por mi. Mi havas jam sufiĉe da stultaj, vantaj pavinoj, kiuj ludas rolon de demonoj, kaj pipras ĝin per pena kaj sen-gusta ĵonglaĵo de temperamento kaj pasio, sufiĉe da tiuj naŭzaj anĝeloj de inspiro. Sufiĉe da tiuj ĝibaj sorĉistinoj, kiuj diboĉas sur Kalva Monto\*) de scienco kaj socia laboro. Oh, kreu al mi, vere terure mi estas lacigita de tiuj Epipsilhidionoj, duonoj kaj duonetoj de viraj animoj. (*Li frotas la frunton, nerve ĵetas kelkajn branĉojn en la kamenon kaj paŝas tra la ĉambro.*) Jen estas ĝuste tio, kion mi bezonas, tian simplulinon, tian blankan nobeletan knabinon,

---

\*) Kalva Monto — laŭ popolaj legendoj — estas loko, kie kunvenadas sorĉistinoj por diboĉi.

jes... tutajn vesperojn pasigi kune kun ŝi apud kamento, kun tia senmakula, konanta nek pekono, nek virton. Senti apud si virinon, kiu konas nek principojn, nek teoriojn, nek direktojn, nek iajn ismojn, kaj estas nur koro, varma, pura koro! Ha, tiam oni forgesus pri la blago kaj la enuo.

BRONKA. Ah, kiel ci trompas sin mem. Du tagojn amuzus cin tia nobeleta knabino, kaj poste... Nu, kio okazus poste, tion ĉi mem rakontu al ci...

KAZIMIRO. Ci tiel pensas?... Sed tio estas mirinda, ke mi kun tia simpla knabino, kiel ci nomis cin, interparolas tutan tagon, ĉion al ŝi konfesas, ĉiun penson al ŝi malkaŝas kaj ne nur ne eksentis eĉ por momento la enuon, sed kontraŭe, neniam antaŭe mi ĝuis tiel bonajn amindajn tagojn, kiel ĉi-tie, ĉe la frato kaj kune kun ci... (*vigle*) Vidu, Bronka, mi vere enamiĝos en ci.

BRONKA (*imitante lian paroltonon*). Se ci ne parolus tion-ĉi kun enuo, iom malgaje, kaj precipe pensante pri tute aliaj aferoj, mi povus cin suspekti, ke ci komencas flirtadon kun mi.

KAZIMIRO (*ridante*). Kial do ne, mia bela bofratino? La arto eksciteti sin mem kaj aliajn povas esti tre bela kaj eleganta... ĝi estas, kvazaŭ oni eltrinkus glaseton da fajra Amontilado.

BRONKA. Mi tute ne sentas deziron gustumi tiun fajran Amontiladon. (*distre*) Sed kion signifas,

ke Tadeo ne alvenas? Mi diras al ci, Kazjo, ke la veturigisto efektive renversis la glitveturilon en kavon.

KAZIMIRO. Ne estu do tia malpacienca, la vojo estas malfacila, la neĝo — profunda, nu, kaj oni ne povas mortlacigi la ĉevalojn.

BRONKA. Nu, jes, ci estas prava. Tamen, Kazjo, ci tiel incitas kaj deprimos per cia enuo kaj per malvarma melankolio, ke... (*ŝi interrompas*).

KAZIMIRO. Nu, ke kio? ke kio?

BRONKA. Ke mi estas preta kuri kaj veki Evan... Mi ne komprenas, kial ŝi ĉiam dormas?

KAZIMIRO. Eble ŝi ne dormas.

BRONKA. Do ŝi evitas nin.

KAZIMIRO. Ne, sed ŝi sentas, ke al ni estas pli bone sen ŝi.

BRONKA. Malbela ci estas. Ŝi estis ĉiam mia plej sincera, plej kora amikino. Ci eĉ ne imagas, kiel feliĉa mi estas, ke ŝi fine estis alveninta. Du jarojn mi ne vidis ŝin. Sed ĉu ci scias, Kazjo, ŝi tute ŝanĝiĝis. Mi ne sciis, ke homa naturo povas tiel tute aliĝi dum tia mallonga tempo.

KAZIMIRO. Kiel, ŝi ŝanĝiĝis?

BRONKA (*iom konsternita*). Ci vidas... mi

havas ĝuste tian... hontemon de pensionanino... por paroli pri tio-ĉi. Nu, sed al ci oni povas ĉion diri ĉar ci kvazaŭ ne estas viro.

KAZIMIRO. Tre ĝusta rimarko. Sed rakontu al mi ion pri fraŭlino Eva, mi estas tre scivolema pri tio.

BRONKA. Ŝi estas orfino kaj tre riĉa. Kaj tio estas ŝia ĉefa malfeliĉo, ke ŝi povis kontentigi ĉiam ŝian kapriĉon... Sed ne pri tio mi volas paroli. Ni estis kune en pensiono kaj nin ligis ia stranga amo. Ŝi amis min ĝis frenezo, tiel, ke ŝia amo estis por mi iafoje suferiga kaj turmenta. Aliffoje ŝi estis tiel senlime bona, ŝi estis jen ŝafido, kun kiu mi povis ludi, jen sklavino, kiu legis miajn pensojn sur mia frunto, jen kapricema kiel tirano, ĵaluzo pri ĉiu mia penso, pri ĉiu kortremo.

KAZIMIRO. Nu, kaj poste kio?

BRONKA. Ŝia zorganto forprenis ŝin de la pensiono post morto de sia edzino, kaj de tiam ŝi fariĝis estrino de sia volo, sia bieno, sia melankolio kaj, eble de l' enuo. Jen ci konsideru, Kazjo, ke ŝi estus edzino por ci.

KAZIMIRO. Hm, hm... Sed ĉi nenion ankoraŭ diris pri la ŝanĝiĝo, kiu okazis en ŝi.

BRONKA. Nu, vidu, vidu, kia mi estas distrita. Frazon mi ne scias fini (*ŝi enpensigas*). Do, malgraŭ

ĉiuj ŝiaj kapricoj kaj subitaj eksplodoj, ŝi estis tre gaja kaj estris nin ĉiujn. Ĉion kaj ĉiujn ŝi sciis primoki, tromplogi. Kaj nun... mi ne komprenas tion tute klare, mi nur sentas, ke .. ĉu ci scias, Kazjo, mi hontas konfesi, ke ŝi estas ia fremda por mi. Mi ne plu estas tiel senĝena kun ŝi, kiel antaŭe, kaj mi havas ian nekapteblan senton de timo kaj... Ah, kia bela ŝi estas, ĉu ci vidis, kia ŝi estas bela? Ĉu ci vidis?

KAZIMIRO. Mi ŝin ne rigardis ĝis nun.

BRONKA. Homo, ĉu ci estas blinda? Ne, efektive ci ĉesis esti viro.

KAZIMIRO. Mi supozas, ke ci estas prava, sed cia gastino komencas min interesi. Nu, kaj kia estas, laŭ cia opinio, la kaŭzo de tiu ŝanĝiĝo. Rompita koro? Perfidita amo?

BRONKA. Ŝi?... Ne, ne — mia Kazjo.

KAZIMIRO. Kiel ci povas ĝin tiel aserti?

BRONKA. Ĉar mi konas ĉiujn junulojn, kiuj ŝin ĉirkaŭadis — mi scias, ke ŝi nur ludis je ili, kaj la sola homo, kiu ŝin interesis, estis Tadeo.

KAZIMIRO. Kio? Tadeo ŝin konis?

BRONKA. Evidente, li konis ŝin antaŭ ol li min ekkonis.

KAZIMIRO (*vigle*). Nu, kaj ili ne enamiĝis unu al la alia?

BRONKA (*paŝas malantaŭen kvazaŭ malagrabla tuŝita per io*). Ĉu ci opinias, ke mi ŝin tiel varme kaj kore al ni invitus, se mi ne estus tute certa, ke ili estas tute fremdaj por si!

KAZIMIRO. Jes, ĝi estas vero, aŭ, pli ĝuste, povas esti vero, ĉar mi ne konas tiel perfekte virinan koron.

BRONKA. Mi nur timas, ke estos malagrabla al Tadeo, ke mi ŝin tiel subite, sen lia scio invitis Eble li volus pasigi kelkajn unuajn tagojn post la reveno nur kun ni... Por mi ŝi estas pli kara ol fratino, mi ŝin amas pli ol ĉion, sed por Tadeo ŝi estas fremda.

(*Aŭdiĝas sonoriloj de glitveturilo, enveturanta en la korton.*)

BRONKA (*kun ĝoja ekkrio*). Tadzjo venas! Tadzjo venas! Ah, fine! (*Ŝi elkuras tra l' dekstra pordo.*)

## SCENO II.

KAZIMIRO (*sidas kaj rigardas post ŝi kun neesprimebla malgajo, tordas malkviete lipharon, almetas branĉojn en la kamenon, paŝas tra la ĉambro, haltas, kaptas per la manoj sian kapon kaj murmuradas mallaŭte*). Jes, jes tro malfrue — tro

malfrue... (*Li sidiĝas, ekbruligas cigaredon, apatie, enpense. En la antaŭĉambro aŭdiĝas la voĉo de BRONKA: „Mia Tadzjo plej kara, mia Tadzjo!“ Kazimiro ekstremis subite. La voĉo de TADEO: „Ah, kiel mi sopiris al cil!“ La vizaĝo de Kazimiro kuntiriĝas per dolora kun malagrabla rideto.*)

## SCENO III.

BRONKA. Venu, venu, mia karuleto; ci tiel frostiĝis — venu, ci varmiĝos ĉe la kameno.

TADEO. Sed mi tute ne sentas malvarmon, kara infano. (*Li salutas Kazimiron*) Nu, kara Kazjo, ĉu ci bone gardis la domon? Ĉu ci ne koketis Bronkon per metafiziko kaj arto?

KAZIMIRO. Tute ne, antaŭ ĉio mi penis prepari Bronkan al tio, ke mi jam ne foriros de vi.

TADEO. Nu kio, estas al ci bone ĉi-tie?

BRONKA. Sed venu do, Tadzjo, venu al la kameno, ci tiel frostiĝis.

TADEO. Mi tre dankas cin por la kameno, sed mi plezurege manĝus ion post tiu frosto, ĉar mi estas malsataga.

BRONKA. Bone, bone! tuj... (*elkuras*).



#### SCENO IV.

TADEO (*gaja kaj feliĉa*). Jen, Kazjo, mi trovis feliĉon kaj trankvilon. Neniam mi estus kuraĝinta eĉ revii pri tia paradizo. Kaj antaŭ ol mi ekkonis Bronkan, ŝajnis al mi, ke jam ĉiujn vivofortojn mi perdis. La koro estis seka, la animo suferlaca, kaj tiu terura, infera enuo heredita jam ekpremadiis min iom post iom, kiel sufoka inkubo.

KAZIMIRO. Jes, mi scias, en kia terura, senespera stato ci estis tiam. Ĉiun cian leteron mi legis kun malkvieto, ĉar mi timis trovi en en ĝi: „adiaŭ, kara frato, mi enuas morte, kaj tial mi foriras al lando de eterneco...” Pli ĝuste, mi ne timis, ĉar kontraŭ la enuo tio estas la sola rimedo. Tamen ne agrable estas ricevi tian leteron de sia frato... Sed diru al mi, kial ci, kiu estis ĉiam tia vigla, aminda knabo, tia plena de viveco kaj forto — enfalis en tiun inferan malesperon. Pri mi — tio ne estas miriga, ĉar de infaneco mi estis ĉiam plorema malviglulo, sed ci, ci?

TADEO. Mi devus longe paroli. Nur enuigis cin la rakontado pri tiuj teruraj suferoj, kiujn mi travivis. Mi pereigis, se mi ne ekkonus Bronkan.

KAZIMIRO (*senzorge*). Ĉu virino estis la kaŭzo de tio?

TADEO. Jes kaj ne... Ĉu mi scias... la nedifinebla sopiro, pri kiu kaj pro kio — mi ne scias.

KAZIMIRO. Ĉu tiu virino estis malbona? Perfidema?

TADEO. Ne, kontraŭe, ŝi nur perdis la kapablon vivi. Ŝi turmentis sin mem kaj aliajn. Ekregis ŝin ia freneza deziro detruadi. Ah, kiel mi suferis!

KAZIMIRO. Nu, kaj poste kio?

TADEO. Poste... Hm... Ŝi volis esti sklavino kaj devis esti reĝino. Mi tro timis ŝin perdi kaj bridi ŝin mi ne sciis. Mi malestimis min. Mi malamamis ŝin kaj min mem. Nenio helpis.

KAZIMIRO. Nu — kaj..?

TADEO. Finiĝis la malespera balado.

KAZIMIRO. Nu, kaj neniam plu ci vidis ŝin?

TADEO. La lastan sciigon pri ŝi mi ricevis en la tago de edziĝo. Ŝi sendis al mi tiel koran, varman kaj sinceran leteron, ke mi forgesos pri ĉiuj ofendoj.

KAZIMIRO. Sed eble tio estis nur malbona kaj venĝema virina ruzajo.

TADEO. Ho, ne. Ŝi estis amikino de Bronka, amis ŝin per pasia amo kaj ŝi estis vere feliĉa, ke Bronka edziniĝas kun la homo, kiun ŝi, kiel ŝi mem skribis, povus nur malfeliĉigi.

KAZIMIRO (*esploreme*). Kaj poste ci jam neniam ŝin vidis?

TADEO. Ne.

KAZIMIRO. Kaj neniam ci pensas pri ŝi?

TADEO. Ne. En mia koro kaj penso estas loko nur por Bronka.

KAZIMIRO. Kaj se ci revidus ŝin subite.

TADEO (*enpense*). Se mi ŝin revidus? Ne.. nun ŝi jam tute ne impresus min. La amo al ŝi jam de longe cindriĝis. Cetere mi eĉ ne scias, ĉu ĝi estis amo. Eble ĝi estis nur junula ambicio de l' homo, kiu neniam renkontis kontraŭstaron, kaj kiu eksaitiĝis ĝis frenezo tial, ke li ne povis ekposedi plene la virinon, kiun li volis. Konsideru krom tio la honton, kiun mi sentis antaŭ mi mem, la senton de necerteco kaj de neplenumitaj deziroj, kaj ci eble havos la precizan bildon de la tiama stato de mia animo. (*Li leviĝas kaj promenas tra la ĉambro.*) Se mi ekvidus ŝin... tiel subite... hm... eble ekstremus io tie sur la fundo de mia animo...

KAZIMIRO. Ŝajnas, ke ci ne estas certa pri ci.

TADEO. Se mi ne havus Bronkan apud mi... Sed ci komprenas, mi kun mia forta kaj energia karaktero, mi ne sentis min bone inter tiuj mezepokaj malvarmaj kaj malgajaj muroj, kie ŝi nur povis vivi. Tie dum noktoj vagadis fantomoj kaj inkuboj. La energio fandiĝis, kiel vakso en la fajro. Kaj tiu furioza melankolio elsuĉadis la medolon el miaj ostoj. Kaj rigardu ja: mia kapo estas kreita por baniĝi en la sunlumo, kaj miaj pugnoj — por batali, se tio estus necesa, kun la potenco ankoraŭ pli forta ol mi.

(*Li rektiĝas forta kaj subite kun ĝoja rido laŭte manklakas.*) Hej, venu do, Bronka, venu!

BRONKA (*post la scenejo*). Tuj — tuj!

KAZIMIRO. Kaj kie ci ekkonis Bronkan?

TADEO. Jes — interesa. Tiom interesa, ke ĝis kiam pri tiaj aventuroj mi legis en romanoj — ĉar pro malespera enuo mi ofte legadis romanojn — mi ne kredis, ke tiaj historioj povas ankaŭ en la efektiva vivo okazi.

### SCENO V.

(*Eniras Bronka kaj post ŝi lakeo kun pleto, plena de manĝetaĵoj kaj fruktaj brandoj*)

BRONKA (*karese alpremas sin al Tadeo karesas lian vizaĝon per la mano*). Kia ci estas malpacienca. Mi ja volis mem ĉion prepari por ci.

TADEO. Sed por kio tiel multe?

BRONKA. La vespermanĝo ankoraŭ ne baldaŭ estos, manĝu — manĝu.

TADEO (*plenigas glasetojn per brando kaj trinkas al Kazimiro; manĝas kaj parolas*). Terure blovegas per neĝo. Je unu paŝo oni nenion vidas. Neĝamasiĝoj atingas ĝis la zono.

BRONKA. Ah, kiel mi timis pri ci.

KAZIMIRO (*serce*). Ah, jes, ŝi imagis plej te-

rurajn ciajn suferojn kaj turmentojn sub la renversita glitveturilo.

TADEO (*ĉirkaŭprenas ŝian kapon*). He, ci infano, infano, je unu paŝo mi ne povas foriri de ci.

BRONKA. Ĉar mi scias, ke apud mi nenio malbona al ci okazos.

TADEO (*subite interrompas*). Mirige! Mia me moro estas pli malbona, ol ĉe la kokino. Tuj, tuj mi venos (*li iras al la pordo*).

BRONKA. Kien ci iras?

TADEO. Tuj, tuj, kara; surprizo (*foriras en la antaŭĉambron*).

(*Post la scenejo forta voĉo de TADEO: „Paŭlo, Paŭlo!“*.)

#### SCENO VI.

BRONKA (*gaja kiel infano*). Certe li denove faris al mi ian multekostan surprizon. Mi devas nun serioze ekkoleri kontraŭ li, ĉar mi havas jam amasegon da veluro, silkajoj kaj aliaj multekostaj ŝtofoj, per kiuj li min superŝutas.

KAZIMIRO. Li amas cin, kaj por amanta viro estas granda ĝuo faradi tiajn surprizojn. Sed aŭdu, Bronka, ci ja ankaŭ faris al li surprizon. Mi nur pensis, ĉu ĝi estos agrabla al li. Tadeo nun estas feliĉa, kaj tiu feliĉo duope estas ĵaluza kaj egoista. Mi timas refoje, ke mi al vi malhelpas, kaj des pli ŝi, kiu laŭ cia diro, estas tute fremda por Tadeo...

BRONKA (*vigle*). Ne... ne... ĝuste ne. En tio kuŝas tuta nia ruzeco virina. Se oni volas konservi amon de viro, oni devas de temp' al tempo forigi lin de si kaj lasi lin sola. Mi bone faris, bone. Mi amuzos min kun Eva, mi ludos, legos, kaj li vagadu, ĉasante en arbaro, marĉandu kun aĉetantoj pri prezoj por greno kaj revenadu hejmen kun ĉiutage pli granda sopiro.

KAZIMIRO (*kun malgaja ironio*). Mi ne pensis, ke ci povus apliki tian subtilan taktikon.

BRONKA (*ridante*). Tute ne subtila, nur bone provita de niaj patrinoj kaj avinoj.

KAZIMIRO. Bone, mi mi nur timas, ke hodiaŭ io malbonigos la humoron al Tadeo. Mi lin amas, kiam mi vidas en li tiun forton kaj vivemon kaj tiun trankvilan spirit-ekvilibron de homo certa pri si, ricevitan de li dank' al ci.

BRONKA. Pri Tadeo ne timu. Nur ci ne vagu tutan vesperon kiel martiro, kaj ne molbonigu la humoron al mi mem. Petu pardonon, kisu la manon.

KAZIMIRO (*tenas ŝian manon, sed ne kisas kaj rigardas ŝiajn okulojn*).

BRONKA. Nu, kion ĝi devas signifi?

KAZIMIRO. Nenion, mi nur permesas al mi la lukson teni iom cian bonan, amindan, varman maneton de infano. Oni sentas, kvazaŭ io degelus ĉirkaŭ la

koro (*li kisas ŝian manon. Bronka rigardas lin longe*).

BRONKA. Ci, Kazjo, efektive estas tre malgaja kaj laca.

KAZIMIRO. Tiel estas, kiam la homo ne naskiĝis sub la feliĉa astro, sub kiu naskiĝis Tadeo.

### SCENO VII.

(*Eniras TADEO, disvolvas multekostan silkan ŝalon ĉe la piedoj de Bronka*). Per tiu-ĉi ŝalo mi devis sterni la vojon de glitvetuurilo ĝis sojlo de nia domo, kiam ci antaŭ momento elkuris renkonte al mi.

BRONKA (*jetas sin sur lian kolon*). Mia ora, mia ci dolĉa, mia ci nekorektebla malavarulo.

KAZIMIRO (*momenton rigardas ilin, poste leviĝas*). Nu, mi lasas vin al via feliĉo, mi skribos dume kelkajn leterojn, (*al Bronka*) kaj por la vespermanĝo en tia solena festo mi certe devas min vesti en frakon.

BRONKA. Kaj kiel ci kuraĝus alie aperi antaŭ miaj okuloj?

KAZIMIRO. Do ĝis la revido! (*li eliras, haltas momenton antaŭ la fenestro kaj murmuris*) Ah, kiam fine tiu neĝo ĉesos! (*li turnas sin al Tadeo*) Hej, Tadeo, kia feliĉa ci estas, ke la neĝo ne malgajigas al ci la animon (*eliras*).

### SCENO VIII.

BRONKA (*rigardas post Kazimiro*). Kio estas al Kazjo? Li estas tiel strange malgaja, pensema.

TADEO. Ĉu estas al ci malbone kun li? Ci ankoraŭ ne al kutimiĝis al li?

BRONKA. Ah, ci ja scias, kiel bone estas al mi. Li agas tiel, kiel milda, senvarma suno aŭtuna. Estas kun li iom malgaje, sed beate kaj trankvile.

TADEO. Ah, jes, jes. Nia familo finiĝas. Li kaj mi, ni estas lastaj, malfortaj, aŭtunaj branĉoj sur la maljuna kaj tiel forta iam trunko de nia familio.

BRONKA. En Kazimiro mortas via familio, sed ne en ci. Ah, kia forta, fortika ci estas, kiel radias cia vizaĝo per feliĉo kaj forteco.

TADEO (*ĉirkaŭprenas ŝin, kondukas al la kameno kaj sidigas apud si*). Cia amo donis al mi tiun fortecon.

BRONKA. Kaj ciam okuloj jen ardas kiel karboj! kvazaŭ ci volus ekposedi tutan mondon, jen ili estas tiaj dolĉaj kaj bonaj (*ŝi prenas lian kapon, alpremas ĝin al sia brusto kaj kisas liajn okulojn*), se mi povus ilin kisi — kisi sen fino — sen konscio...

TADEO. Ci mia sola feliĉo, kiel mi amas cian belan amon.

BRONKA (*ludas kun liaj haroj*). Ah, kiajn mirinde molajn harojn ci havas. Ĉu ci scias, mi havas

impreson, ke mi tuŝas ne ciajn harojn, sed iajn molegajn, lanugajn kreskaĵojn. Antaŭ la domo de mia patro estis bedo kun tia delikata, lanuga kreskaĵaro, ci ne imagas kun kia plezurego mi ruliĝis en ĝi. Tiel mi volus ruliĝi en ciaj haroj (*ŝi kisas liajn harojn*).

TADEO. Ĉu ci memoras, kiel ektimiĝis la ĉevalo, sur kiu ci rajdis?

BRONKA. Mi morte timis, mi perdis konscion, kaj samtempe mi ĝuis strangan plezuron esti portata de tiu senbrida, fiera, bela besto.

TADEO. Kaj ĉu ci memoras, kiel mi kaptis cin kaj al la brusto metis kaj portis ĉirkaŭ la ĉambro? (*Li prenas ŝin sur siajn genuojn, ŝi ĉirkaŭprenas per brakoj lian kolon*).

BRONKA. Mia ci — ci sola. Ekzistas, oni diras, ia kutimo, ke juna knabino devas ĉe la altaro plori, malesperi, sed mi ne ploris, krei mi volis, krei pro feliĉo kaj emocio, pro la ĝojo, ke baldaŭ ni ekflugos per la glitveturilo, jungita per ciaj sovaĝaj ĉevaloj, al ci, al cia domo...

TADEO. Ĉu ci memoras tiun januaran nokton, la ĉielo brilis, rebrilis la frosta neĝo, kaj la ĉevaloj kuris tiel, ke per ŝvitsaŭmo ili tute kovriĝis (*ĉirkaŭprenas ŝin ĉiam pli forte*).

BRONKA. Ah, alpremu min tiel, alpremu al mi, kiel tiam, kiam ci kaŝis min tutan sub cian lupelton (*subite ŝi foriĝas de li*) Sed diru al mi, kial

ciaj okuloj ekbrilis tiel malvarme, ŝtale, kiam ni estis jam en la domo?

TADEO. Mi metis krucon sur la pasintajon.

BRONKA. Kian ci havis pasintajon?

TADEO. Kian pasintajon... Ha... riĉan kaj terure malgajan... Tutan Golgoton de suferoj kaj doloroj, tutan Gehenon de internaj luktoj, de faloj, de malespero, malestimo kontraŭ mi mem kaj la tuta mondo...

BRONKA. Ĉu ci amis iam?

TADEO. Mi ne scias, ĉu ĝi estis amo. Eble al mi nur ŝajnis, ke mi amis. Mi ne volas krei teorion, kio estas amo kaj kio ne estas, sed al mi ŝajnas, ke en ĉiu amo devas esti fiereco, reĝa certeco pri la homo, kiun oni amas, kaj tiun certecon mi eksentis nur apud ci.

BRONKA. Tadzjo, estu sincera. Mi parolis hodiaŭ kun Kazimiro pri Eva.

TADEO (*mirigita, iom nekontenta*). Pri Eva?

BRONKA. Jes, pri Eva. Kial mia sinjoro tiel malsereniĝis?

TADEO. Ne, mi nur rememoris, ke jam en unuaj semajnoj post nia geedziĝo ci volis montri al ŝi nian feliĉon, sed mi deziras nenion krome — nur vivi kun ci, kun ci sola, ĉar la feliĉo de l' amo

estas tre delikata kaj povas esti detruita per iu ajn bagatelajo.

BRONKA. Per kia?

TADEO. Plej ofte per la ĉeesto de fremda persono. Ci scias ja, ke Eva tre ŝanĝiĝis... Kazimiro malgaja kaj trankvila, efikas — ci ĝuste diris — kiel suno aŭtuna, sed ŝi estas kiel kratero ŝajne estingiĝinta, la fajro povas eksplodi en ĝi ĉiumomente.

BRONKA. Kiel ci ekkonis ŝin tiel bone?

TADEO. Kiel? Ci scias ja, ke mi ofte ŝin renkontadis. Ŝi ekinteresis min, kiel interesis ankoraŭ antaŭ nelonge Kazimiron ĉiu nekonata pentraĵo, ĉiu ĉiu ekzotika objekto, besto aŭ floro.

BRONKA (*malкураĝe kaj timeme*). Tadzjo, Tadzjo!

TADEO (*mirigita*). Kio do, infano mia, kio?

BRONKA. Ĉu ci scias, mi aŭdis, ke la amo malvarmiĝas, se la homoj ĉiam estas kune, ke ili bezonas kelkatempan disiĝon, ke ili devas ofte forlasadi unu la alian, por ke ilia amo restu ĉiam freŝa, kaj por ke ili kun ĉiam ankoraŭ pli granda sopiro al si revenadu. Mi ne scias, de kie venis al mi tiu penso, sed mi volus, ke ci nun ĉasadu, vizitadu najbarojn... sed mi ja ne povas resti tutan tagon tiel sola, atendate cin.

## SCENO IX.

(*Dismoviĝas la pordokurtenoj de la flankaj ĉambroj kaj en la pordo aperas Eva. Ŝi rigardas kadavre pala kun esprimo de nekvietebla malgajo Tadeon kaj Bronkan, kiuj, turnitaj vizaĝe al la kameno, ne rimarkas ŝin.*)

BRONKA. Ĉu mi estas prava, Tadzjo? Diru, ja jes?

TADEO. Sed, kara infano, de kie aperas ĉe ci tiaj pensoj? Ĉu povas homo, post tutjara kunvivado, ami la virinon pli, ol mi cin amas, kaj pli sopiri je ŝi, ol mi sopiras je ci?

BRONKA. Tadzjo, cial leteroj, cial amegindaj, karaj leteroj... Kaj tiu lasta — tia bela, mi ankoraŭ portas ĝin ĉe la brusto (*ŝi elprenas la leteron el korsaĵo kaj kisas ĝin varme*).

EVA (*foririnte por momento post la pordokurtenon de l' apuda ĉambro, en kiu troviĝas oranĝerio, promenas tie kun nerva maltrankvilo; subite:*) Mi aŭdas voĉojn en la ĉambro. Viaj tapiŝoj estas tro molaj, por ke vi povu aŭdi miajn paŝojn..

TADEO (*saltleviĝas*). Kio estas?... Kiu estas?..

EVA. Ĉu mi povas eniri?

BRONKA. Kazjo, kio okazas al ci? (*Ŝi rigardas lin longe kaj iras al la pordo.*) Venu do, Eva, venu. Ha, kiel Tadeo ĝojos! (*Ŝi larĝe dismetas la kurtenojn. Tadeo rigardas kvazaŭ songante. Eva eniras kaj samtempe rulkurteno malleviĝas.*)

(Fino de l' unua akto.)

## AKTO II.

### SCENO I.

*La sama ĉambro. Krepusko de vintra posttagmezo. Post la fenestro brilas blanka tavolo de l' neĝo, en la kameno — fajro. Scenejo restas dum momento malplena. Poste eniras Tadeo kaj Eva.*

EVA (*alkuras al la kameno kaj varmigas la la manojn*). Oh, kiel mi frostiĝas, kiel mi frostiĝas, kaj ŝajnis al mi, ke mi varmiĝos ĉe vi.

TADEO. Ci nenie varmiĝos.

EVA. Kio? Mi ja alvenis ĉi-tien por varmigi mian koron apud via feliĉo.

TADEO (*ironie*). Por varmigi ĝin, oni antaŭe bezonas ĝin havi.

EVA (*longe*). Ĉu je-e-s?

TADEO. Jes... Sed ni lasu tion. Dum nia promenado *li rigardas horloĝon* — kaj ĝi daŭris pli ol tri horojn — ni certe jam sufiĉe superŝutis nin per komplimentoj, eble ni komencu paroli pri io alia.

EVA. Komencu ci... Sed antaŭe ordonu lumigi... tre ĉi-tie regas krepusko, melankolie brulas fajro en la kameno... fajrera brilo de l' neĝo post la fenestroj, molaj tapiŝoj, kurtenoj... Ha — ha... tio estas danĝera — tio malkvietigas, vekas sopiron... (*enpense, rigardante ĉirkaŭen*) Ĉu ci mem aranĝis tiun-ĉi loĝejon?

TADEO. Mi mem.

EVA. Tute konscia pri tio, kion vi faris?

TADEO. Tute.

EVA. Kaj ĉu ci scias, ke cia loĝejo estas kopiaĵo de la mia?

TADEO. Mi scias.

EVA. Kaj kial ci tion faris?

TADEO. Por provi miajn fortojn, por konvinkigi, ke mi jam deĉutimiĝis, forgesis, sufokis en mi la fantomon.

EVA (*ridetante*). Ĉu ankaŭ por tio ci pendigis en cia laborejo la bildon de mi pentritan, kiun mi donacis al ci?

TADEO. Ci estis en mia laborejo?

EVA. Dum tuta nokto antaŭ la tago de cia alveno.

TADEO. Kaj kion ci faris tie?

EVA. Kion mi faris?... Mi estis feliĉa, ke ci min amas kaj sopiras al mi.

TADEO. Tiun-ĉi fojon ci tre eraris.

EVA. Ne, ne — mi ne eraris. Cia laborejo aspektas kiel sanktejo, en kiun ci por tutaj horoj foriĝas de cia feliĉo, de cia varma angulo, de la korala buŝo de Bronka, por ŝiri tie al ci la koron kaj sopiri pri tio, kio donas al ci la amindan ĝuon, por deziri per ĉiuj fortoj tion, kio pasiigas cian sangon. Oh! soifi, sopiri, sopiri..

TADEO. Pri kio?

Pri tio, kio donas al ci doloron kaj nekvieteban deziron. Ci estas kreita por luktado — ci iam revis esti armeestro, krei novajn mondojn. Haltadi nur por demeti inter kadavroj kaj rubaĵo la kaskon de l' kapo, nur por viŝi ŝviton de la frunto... Ne por ci estas la trankvilaj anguloj, la molaj tapiŝoj, la gajaj kamenoj. Tio estas bona por cia frato, kies animo cindriĝis.

TADEO (*rigardante ŝin serioze*). Antaŭ ĉio diru al mi, por kio ci alvenis ĉi-tien? Ci ja ne havas tiel krimajn instinktojn, por detrui perforte la feliĉon de du homoj, kaj ankoraŭ de la homo, al kiu ci preskaŭ rompis la vivon.

EVA (*ridante frivole*). Kia domaĝo, ke mi tiel baldaŭ ellasis cin el miaj manoj...

TADEO. Ci ne ellasis min. Mi mem elŝiriĝis.

EVA (*enpense rigardas senmove en fajron*). Jes, tio estas vero. Mi admiris cian forton kaj nur tiam mi ekamis cin...



TADEO (*ridas moke*). Mi scias jam, mi scias. Sed permesu, ĉar ci senĉese interrompas min. Respondu fine al mia demando: por kio ci alvenis ĉi-tien?

EVA. Ci do ne scias, ke Bronka insiste min invitis? Ke eble ŝi uzis eĉ senkulpan mensogon por min venigi: ŝi skribis al mi, ke ŝi estas malsana.

TADEO. Ci ne devis veni.

EVA (*mirigita*). Kial? Ci ja min senĉese vokis, ci ja senĉese sopiris al mi.

TADEO. Mi pri ci sopiris, mi vokis cin!? Sed mi ja tute forgesis pri ci.

EVA (*malgaje*). Ci ne forgesis pri mi. Tuta cia domo estas de mi saturita. Transpaŝinte la sojlon de cia domo, mi tuj sentis, ke ĝi estas mia domo, ke mi sola plenigas ĉion ĉirkaŭe.

TADEO. Ha, ha... ci pensas pri la mebloj. Nu, do mi diros al ci, ke mi intence penis imiti ciajn ĉambrojn, ĉar ci scias, se ekzemple drinkulo dekutimiĝas de la brando kaj volas konvinkiĝi, ĉu li efektive dekutimiĝis, tiam, malgraŭ abomeno li trinkas de temp' al tempo unu, du glasetojn. Se li ne eksoifos tutan botelon, tio signifas, ke li jam liberiĝis de la malbona kutimo. Ci komprenas? Mi intence aranĝis tiel, ke ĉio rememorigu al mi pri ci...

EVA (*malice*). Kaj tamen...

TADEO. Tamen mi neniam pensis pri ci, eĉ en sonĝo ci neniam aperis antaŭ mi.

EVA (*jetas ŝtipojn en la kamenon, kvazaŭ ne aŭdante, kion diras Tadeo*). Ci multe suferis, malfeliĉulo. En cia animo certe estis terura kverelo, malpaco kaj lukto. Havi ĉiujn kondiĉojn por feliĉo, kaj esti riĉa, havi ĉion laŭ ekdeziro, krom tio edzinon, kiu amas kaj kiu estas amata... Sed ĉu ci efektive ŝin amas? Eble ci estas nur sata de batalado, de doloroj kaj suferoj, kaj nun por momento inter kadavroj kaj rubajo demetis batalan kaskon kaj viŝas ŝviton de lacigita frunto?

TADEO (*moke*). Jam amuzis min ciaj metaforoj, hodiaŭ ili jam nenion diras al mi.

EVA (*neatentante*). Ci estas feliĉa nur por povi ripozi en la plej verda en la valoj, por ataki la montojn... (*ŝi deturniĝas penseme de l' kameno*) Ah, kiel mi cin amus tiam.

TADEO. Aŭskultu, Eva, ci devas forlasi mian domon. Ni lasu la ludon je divenado de nefinitaj frazoj. Ci scias, kiel mi cin amis. La neĝo, blanka, mola neĝo kovris ĉiujn rememorojn, kaj doloron, kaj luktojn kaj suferojn, kaj se la neĝo malaperos...

EVA. Nu, do kio?

TADEO. Tio estus malbona.

EVA. Por kiu?

TADEO. Por ci, por mi, kaj antaŭ ĉio por Bronka.

EVA (*frotas sian frunton*). Por Bronka, por

Bronka. Oh, mi ŝin tre amas... (*post momento*)  
Bronka estos tre malfeliĉa...

TADEO (*venas al ŝi kaj sidiĝas apud ŝi*).  
Aŭskultu, sed aŭskultu bone, kaj penu kompreni tion,  
kion mi diros. Ci havas la kutimon ŝajnigi, ke ci ne  
aŭdas, sed nun estu tiom afabla kaj forlasu tiun  
belan kutimon, ĉar tiu ludo estas ne ĝustatempa.

EVA (*indiferente*). Mi aŭskultas kaj mi penas  
kompreni.

TADEO. Mi malkaŝe konfesos, ke efektive mi  
estas incitita kaj malkvietigita, ankoraŭ pli mi diros  
al ci, mi ofte eĉ pensis pri ci, mi eĉ sopiris pri tiu  
sufero, kiun ci donis al mi, eble mi sopiris pri tiu  
turmento, kiun mi travivis apud ci, sed nun lasu min  
trankvila. Mi amas Bronkan kaj ĉe Bronka mi restos.

EVA. Restinte, ci mortturmentos ŝin. La vundoj  
en cia koro renoviĝis, ci flugas en fajron, kiel pa-  
pilio; de la momento, kiam ci ekaŭdis mian voĉon  
post la kurteno, falegis la tuta kastelo el kartoĵ,  
kiun ci kun tiom da peno kaj laboro konstruis kaj  
nomis ĝin feliĉo (*ironie*) He, he... min ci ne trompos.  
Tro malvasta estas por ci la varma, trankvila an-  
guleto. Ci avidas detruadi la barojn, konkiri la  
mondojn. Ci estas la lasta el la granda, bela gento  
de Konkvistadoroj, al kiuj ne sufiĉis la malsaĝa  
trepeco nomata Eŭropo.

TADEO (*sarkasme*). Mi dankas por tiuj novaj  
mondoj, kiujn mi povas konkiri, buĉinte ian sen-  
kulpan, malsaĝan ŝafaron.

EVA. Ne estas tio. Antaŭe oni bezonas skla-  
vigi la maron, trafosi la montojn, oni bezonas pasi  
tra ĉiuj suferoj kaj ĝuoj, por ke tiu nova mondo  
aperu antaŭ la okuloj, kaj okaze iu konkvistadoro  
dispremos per la fera piedo ian floron, ĉu tio hav-  
as ian gravecon (*longe kaj kvazaŭ dormeme*). Kian  
gravecon havas, ke oni elhakos eĉ la plej belan  
arbaron, se tio estas farita por ĝuigi siajn okulojn  
je nova kaj nekonata ankoraŭ miraklo.

TADEO. Kaj kio plu... plu...

EVA. Atendu... atendu... (*subite ridas*) Ha..  
ha... kiel ondegas en ci senĉese la pasia, varmega  
sango de konkvistadoro (*rigardas lin kaj denove  
kvietigas*). Antaŭe oni devas sklavigi la maron,  
trafosi la montojn, per la fera piedo dispremi ian  
floron.

TADEO (*minace*). Pri Bronka ci pensas?

EVA (*silentas, disfosas la fajron per la fost-  
leto kaj enĵetas novajn ŝtipojn*).

TADEO (*mistere*). Pri Bronka?

EVA (*indiferente*). Ci devenis.

(*Silento, dum kiu Tadeo incitita paŝas tra  
la ĉambro*).

TADEO (*aliras al ŝi*). Eva, mi cin petegas,  
lasu nin trankvilaj.

EVA. Sed ci ja ne havos plu trankvilon.

TADEO. Mi scias, mi scias pri tio, sed almenaŭ Bronka ĝin havos.

EVA. Vidu, Tadeo, ci jam blindiĝis por ĉio, kio cin ĉirkaŭas. Ĉu ci ne vidis, kiel ŝi cin observis per maltrankvilaj okuloj, kiel ŝiaj rigardoj timemaj, kvazaŭ timigitaj hirundoj ripozis jen sur ci, jen sur mi... Oh, mi ŝin tre amas... Ci ne vidis, kiel ŝi estis incitita per ia nenatura maltrankvilo, kiel ŝi turnis sin senĉese al Kazimiro, kvazaŭ ŝi volus peti de li helpon...

*(Silento. Tadeo paŝas senĉese laŭlonge kaj laŭlarĝe de la ĉambro)*

TADEO. Hm... ci do opinias, ke mi estas kreita por konkiri novajn mondojn. Por kio?

EVA. Por vivi bele kaj esti bela.

TADEO. Kaj se oni ne scias konkiri?

EVA. Tiam oni pereas, tio ankaŭ estas bela.

TADEO. Kaj se ĉio ĉi estas vana baraktado, senidea detruado de si mem kaj de ĉio ĉirkaŭanta.

EVA. Tio ankaŭ estas bela. La homo, kiu baraktas, turmentas sin kaj ion deziregas, eĉ se neniam atingos la celon, estas bela.

TADEO. Kaj se li deziras silenton, kvieton, trankvilan angulon, varman kamenon?

EVA. Tio estas por Kazimiro.

TADEO. Kaj por mi?

EVA *(longe rigardas lin kaj ridetas)*. Por ci? — mi — nur mi — mi sola.

TADEO. *(haltas antaŭ ŝi, kaj diras per obtuza voĉo)*. Kial, kiam mi ĉion metis ĉe ciaj piedoj, kiam kun ci kaj per ci mi povis konkiri la novajn mondojn, pri kiuj ci nun al mi parolas, kial ci min tiam forpuŝis kaj malakceptis?

EVA. Ĉar ci ne sciis esti mia sinjoro.

TADEO. Kaj nun?

EVA. Nun mi amas cin, mi amas cin, pro tio, ke ci volis forgesi pri mi, ke ci volis cin venki, ĉar nur fortuloj scias sin venki. Mi amas cin pro tuta supozo kaj timo, ke ci ne volos esti mia.

TADEO *(ridas nerve)*. Necese estas lumigi lampon. Bronka baldaŭ alvenos. Ŝi povus efektiviĝi ciajn literaturajn revaĵojn kaj suspekti min, ke mi pasigas kun ci dolĉajn „heures de confidence“: *(Lumigas lampon. Silento)*.

EVA *(indiferente)*. Ĉu ci longe tiel vagis tra la mondo?

TADEO *(rigardas ŝin mirigite, sed enfalas en saman tonon)*. Jes, longe, preskaŭ du jarojn

EVA. Ci estis ŝajne en Afriko?

TADEO (*mole*). Mi estis, sed tie ĉio malkovrebela estis jam malkovrita de Stanley, kaj mi amuzis min per ĉasado de tigroj... Ci estas prava... ha... ha... ha... Mi estas kreita por esti konkvistadoro. Kiam antaŭ miaj okuloj tigo disŝiris du negrojn, vere, mi ne havis senton de triumfo...

EVA (*mole*). Sed?

TADEO. Kaj... la plej simpla penso trakuris mian kapon, ke nun mia vico venos.

EVA (*mokante*). Kaj ci ne havis pafilon kun ci?

TADEO (*per la sama tono*). La ŝarĝoj malsekiĝis.

EVA. Kaj ci ne timis la morton?

TADEO. Mi deziris ĝin. Tio ja ankaŭ estas bela esti disŝirita de iu reĝa besto.

EVA. Jes, tio estas bela... Sed mi aŭdas, ke Bronka revenas.

(*Oni aŭdas, kiel malfermiĝas la pordo de l' antaŭĉambro; laŭta interparolado de Bronka kun Kazimiro*).

## SCENO II.

(*Bronka kaj Kazimiro eniras*).

BRONKA (*nenature ekscitita*) Ah, se vi sciis kia belega estis la glitkurado. Ha, tiuj flameroj de l' neĝo frostiĝinta sur glacio, luno, la luno... ah, kiel

tio estas belega. Kio, Kazjo, ci mem diris, ke tio estas belega. (*Turnas sin al Eva*). Morgaŭ ci nepre devas iri kun ni, ĉio-ĉi estas, kvazaŭ por ci kreita la neĝo, la luno kaj Kazjo. Ha... ha... ha... vidu, Kazjo tia enuiganta, kaj mi ne vidis homon, kiu tiel bele glitkuras, kiel li.

KAZIMIRO. Bronka, laŭ kutimo, trograndigas, tute ne estis tiel belege. La laĝeto ne estis balaita kaj mia aminda bofratino amuzis sin per tio, ke ŝi vadis en la neĝo ĝis genuoj.

BRONKA (*distrite*). Ah, kiel li mensogas, kiel li mensogas... Ho ci, malbona... (*Subite al Tadeo*). Tadzjo, eble ci estas nekontenta, ke mi permesis al mi tiel longe ĝui la liberecon? Sed mi sciis, karuleto, ke ci estas kun mia kara Eva, mi intence volis, ke vi restu kune, ke ci demetu fine post jaro la kitelon de terkulturisto, kaj ŝvebu kun Eva tie, kie estas tro alte por mi—(*alpremas sin al Eva*). Oh, kia feliĉa ci estas, Eva, ci estas tute alia ol ni, ĉiuj virinoj. Ah, kiel bone mi memoras cin tiam, kiam mi venis al ci post mia fianĉiniĝo. Ci aŭdas Tadzjo? La ĉambro estis sama, tute sama, kiel tiu, en kiu ni nun sidas... (*kvazaŭ vekiginte el dormo*) Eva, tio estas stranga, ke tiu ĉambro estis tute same meblita, kiel la nia.

EVA. Sed, Bronjo, kio estas stranga en ĉi-tio, tio certe estas tute hazarda.

TADEO (*trankvile*). Evidente la sama meblisto aranĝis loĝejon de fraŭlino Eva kaj la mian.

EVA. Mi mem estas mirigita, mi ankoraŭ ne vidis ŝin tia.

KAZIMIRO (*subite*). Sed vi rimarkis, ke Bronka de hieraŭ ŝanĝiĝis?

EVA. Antaŭ momento mi diris la samon al via frato.

KAZIMIRO. Ĉu vi rimarkis, ŝian malkvieton hieraŭ dum vespermanĝo kaj hodiaŭ dum tuta tago?

EVA. Jes, ĝuste, tio mirigas min.

KAZIMIRO. Kaj ĉu vi ne konjektas, kio povus esti la kaŭzo de tiu subita ŝanĝiĝo?

EVA. Ne.

KAZIMIRO, Hm... Sed vi certe rimarkis, ke ankaŭ Tadeo estas ia malsaneta, pensema, distrita.

EVA. Mi ne konis lin alia.

KAZIMIRO. Sed mi konis: li alvenis gaja, feliĉa, sopiranta al Bronka, mi delonge jam ne vidis lin tiel plenan de forteco kaj kredo je si kaj je sia feliĉo.

EVA. Kio do?

KAZIMIRO. (*vigle rigardante ŝin*). Do mi ne komprenas tian subitan ŝanĝon.

EVA. Ŝajnas al mi, ke vi min kulpigas pri tiu subita ŝanĝo de l' humoro.

BRONKA. Hm... evidente. Ĉu ci memoras, Eva, kiel ni sidis antaŭ la kameno? Ci rigardis la fajron kaj mi rakontadis al ci senfine, senfine, mi eĉ ne scias jam, kion mi babilis, sed ci estis tia bona, pacienca...

(*Subite ekridegas, Tadeo aliras al ŝi kun zorgo*).

TADEO. Kio estas al ci, kara infano, kial ci estas hodiaŭ tiel ekscitita?

BRONKA. Ci komprenos, mi volus flugi, flugi alte, kiel birdo, kaj mi nur batas teron per flugiloj kaj mi tiel sopiras kaj deziregas, avidas leviĝi, sed la flugiloj estas kvazaŭ plumbaj... (*al Eva*). Ah, Eva, kia feliĉa ci estas.

KAZIMIRO. Jen, ĉu mi ne diris al ci, ke tia laciga sporto estas malutila? Tiom mi cin petis, petegis, ci ne volis min obei, kaj nun ci devos penti por tiu romantika glitkurado.

BRONKA (*obstine*). Kaj jen ne, ĝuste ne, mi havas jam sufiĉe da nerveksplodoj, mi estas stulta, kapricema infano. (*Ekploregas subite, elkuras en la apudan ĉambron. Eva leviĝas, volas ŝin sekvi*).

TADEO. Restu ĉi-tie, fraŭlino, mi mem ŝin tuj trankviligos. (*Eliras al Bronka*).

### SCENO III.

KAZIMIRO (*malkviete*). Bronka certe estas malsana, tutan tagon ŝi estis malkvieta, iel nenature ekscitita...

KAZIMIRO. Ĉu vi rimarkis, ke Bronka venis hodiaŭ por matenmanĝo kun ruĝiĝintaj okuloj? Mi povus juri, ke ŝi ploris tutan nokton.

EVA. Ĉu vi opinias, ke mi estas kulpa pri tio?

KAZIMIRO. Dio gardu, mi eĉ ne pensis vin pri io suspekti... Mi parolas pri tute alia afero... Mi ne volus, ke vi eĉ por momento pensu, ke mi intencas vin esplori, sed de hieraŭ tiel strange kaj videble ŝanĝiĝis la situacio... Mi sentas en aero ian nebulan enigmon, kiun mi volas solvi... Kiel vi vidas, mi estas nervulo kaj tiaj homoj ne toleras sufokecon antaŭ tempesto.

EVA. Sufokecon antaŭ tempesto?

KAZIMIRO. Jes, jes, estas egale, kiel ni tion nomos, en ĉiu okazo estas en la aero io, kion tiel sentema spirito, kiel Bronka instinkte perceptas... Jen, ĉu vi aŭdas, kiel ŝi ploras?

*(En la apuda ĉambro oni vidas Tadeon, kiel li alpremas al si Bronkan kaj penas ŝin trankviligi).*

KAZIMIRO *(aŭskultante kun ĉiam pli granda malkvieto)*

EVA *(saltleviĝas, kaj ankaŭ malkviete paŝas tra la ĉambro)*.

KAZIMIRO *(sekvas ŝin)*. Ĉu vi aŭdas?

EVA. Silentu... silentu...

KAZIMIRO *(prenas ŝin je la mano, kondukas al la fenestro)*. Ni estu sinceraj, mi vin ne konas,

sed tio, kion mi aŭdis de Bronka kaj de Tadeo, sufiĉas, por ke mi povu formi al mi sufiĉe klaran bildon de via animo.

EVA *(indiferente)*. Sinjoro, ne turmentu min nun. Mi ja scias ĉion, kion vi volas diri al mi.

KAZIMIRO. Ne, ne, vi tion ne scias... Mi neniam miksiĝas je ies aferoj, eĉ je tiaj, kiuj koncernas miajn proksimajn, plej amatajn personojn, sekve Bronkan kaj Tadeon...

EVA. Ni do parolu malkaŝe: vi scias de Tadeo, ke lin kaj min ligis proksimaj rilatoj, mi scias ke li ofte skribadis al vi leterojn, en kiuj li evidente malkovris al vi la staton de sia animo antaŭ tri — kvar jaroj. Vi scias, ke li min amis. Vi scias ankaŭ, ke tian amon la neĝo povas surŝuti, sed nur por ĝin varmigi, kaj fari ankoraŭ pli forta kaj pasia.

KAZIMIRO. Ĝuste tion mi volis diri.

EVA. Bronka rakontis al vi, ke mi freneze ŝin amis, ke ni estis nedisigeblaj en la pensiono. Ŝi ja ĉion ĉi rakontis al vi?

KAZIMIRO. Jes, hieraŭ ŝi longe pri tio parolis.

EVA. Vi estas sincera, do mi ankaŭ estos sincera. Du jarojn poste ŝi alvenis al mi ankoraŭ estante fianĉino de Tadeo, belega, feliĉa, ah, ŝi estis tiel feliĉa, ke kvankam mia koro ŝiriĝis, mi konsentis kun la penso, ke ŝi fariĝos edzino de la homo, kiun mi tiel pasie amis.

KAZIMIRO. Vi lin amis?

EVA. Jes de tiam, kiam mi lin perdis... (*dum momento ili rigardas unu la alian*). Kaj nun vi volas demandi, kial mi venis detrui la feliĉon de mia amikino, ĉu ne vere?

KAZIMIRO. Eble por momento aperis ĉe mi tiu demando, sed tio ja estas tute sensenca... mi diras al vi malkaŝe, ke mi ne sentas troan simpatian al vi. Ne, ne, ne tion mi volis diri. Nur, ke ni havas malmulte da komunaj trajtoj, sed tio ne malhelpas al mi esti justa... (*Subite*), Ĉu vi ĉiam sopiris?

EVA (*apogiskaponal fenestrovitro kaj silentas*).

KAZIMIRO. Vi ĉiam celis al io, pri kio vi sciis ke ĝi estas neatingebla por vi.

EVA (*turnas sin al li kaj silentas*).

KAZIMIRO. La ĉefa deziro de via vivo estas ligi kaj treni post vi la homon, kiu kun neniam atingebla sopiro, blinde vin sekvos.

EVA (*varme*). Jes.

KAZIMIRO (*vigle*). Kaj tiu homo estas Tadeo?

EVA (*forte*). Jes.

KAZIMIRO (*vigle*). Kaj Bronka?

EVA. Ĉu vi aŭdas, kiel feliĉe ŝi nun ridas... Ĉu vi scias, kio nun okazos?

KAZIMIRO. Nu?

EVA. Eniros Bronka, ĉirkaŭprenos min je kolo kaj varme, varme petos de mi pardonon por tio, ke ŝi faris la scenon... Sinjoro... la luno lumas — donu al mi mian pelton... ni iom promenu... eble ni trovos ankoraŭ pli sincerajn tonojn en niaj konfesoj (*rigardas longe Kazimiron*). Vi—vi ja ne neos tion, sinjoro?

KAZIMIRO. Kion?

EVA. Vi amas Bronkan!

KAZIMIRO (*rigardas ŝin longe*). Jes.

EVA. Ĉu vi aŭdas ŝian ridon? Ah tiu ĉarma, arĝenta, knabina rido.

KAZIMIRO. Ni iru jam, ni iru.

#### SCENO IV.

*Bronka kaj Tadeo eniras tenante sin sub la brakon, gajaj kaj feliĉaj laŭŝajne.*

BRONKA (*al Eva*). Kara, amata mia Eva. Ci ja konas min tiel longe. Vi ĉiuj estis tro bonaj por mi. Ci min dorlotis per cia boneco, Tadeo trodorlotis min enfine. Enjo, ci ja scias, ke mi estas frenezulino, ke venas tiaj momentoj, kiam mi estas tute nejuĝebla.

EVA. Kial ci estas tiel malgaja, por kio ci petas pardonon de mi (*karesas ŝin je vizaĝo*) Ah ci mimozo mia, kia nerva kaj trosentema ci estas...

BRONKA. Al infano oni povis pardoni, ke ĝi ne sciis regi siajn kapricojn, sed al mi oni ne devas (*nerve, rapide kaj senorde*). Jen, iafoje ĉirkaŭas min tiaj premantaj pensoj. Ne, ne, ne estas tio... Tio estas tiel, kiel tiam... Ne, tio ne estas ĝuste antaŭsento de malfeliĉo... tio estas nur tre malproksima rememoro pri tiuj teruraj horoj, kiujn mi travivis, estante infano, kiam mi vane serĉis tra la tuta bieno mian fratinton. Mi sciis, ke okazis kun ŝi io malbona. Mi tion sentis. Tutan arbaron mi traserĉis, laŭ tuta riverbordo mi trakuris, kaj mi revenis domon terurita, spireganta (*ĉiam pli terurita ŝi alpremas sin ĉiam pli forte al Eva*). Eva! Eva! Al mi ŝajnis, ke io min persekutas, ke io ŝiras miajn harojn... antaŭ verando mi falis en la herbon. La vizaĝon mi kaŝis en la manoj por ne rigardi malantaŭen, kaj ili iris... iris...

EVA. Kiu?

BRONKA. La kamparanoj, kaj kun ili mia varstino; ili portis sur portilo mian amegatan fratinton... ŝi dronis en laĝeto...

EVA. (*malgraŭvole*). En laĝeto...

BRONKA. Jes, jes—en laĝeto (*al Tadeo*) Ordonu plensuti tiun laĝeton. Ĝi rememorigas al mi ĉiam la nigran profundan okulegon de nia laĝeto...

TADEO. Trankviliĝu, Bronka, trankviliĝu, mi faros ĉion, kion ci ekdeziros. Se ci volus, mi ĉion ĉirkaŭe kun la tero ebenigus (*subite iritita rigardante vigle Evan, kion Bronka, alpremita al Eva*

*ne povas vidi*). Jes, mi faros tion. Lagojn mi plensutos per la tero, la arbojn mi forhakos...

EVA. Eble ankaŭ la neĝon vi balaigos de l' tero? Ah, infanoj, infanoj... Nun al sinjoro Tadeo venis la vico incitiĝi.

BRONKA. Per kio mi cin hodiaŭ incitis Tadzjo?

TADEO. Sed, kara Bronjo, ci tute min ne incitis, ci ja scias, ke mi ĉiam estas malgaja, kiam mi vidas, ke ci ne povas forgesi apud mi pri ĉiuj ĉi doloraj impresoj de la infaneco.

EVA. (*karesante ŝin je vizaĝo*). Forgesu, forgesu. Lasu min, sinjoroj, por momento kun Bronka, ŝi trankviliĝos kun mi.

KAZIMIRO. Vi estas prava, fraŭlino, ni foriru, Tadeo.

TADEO. Trankviliĝu, trankviliĝu, Bronjo.

BRONKA. Rigardu, mi jam estas trankvila, sed vi iru jam, mi sentos min bone kun Eva, ŝi sola sciis min ĉiam trankviligi.

(*Kazimiro kaj Tadeo foriras*).

KAZIMIRO (*turnas sin de l' pordo*). Fraŭlino Eva, vi deziris promeni en parko!

EVA. Oh, poste, poste, kiam Bronka estos jam tute trankvila.

BRONKA. Do ni iros ĉiuj kune.

EVA. Ne, ne, karulino, mi volas esti agrabla al ci gasto; al junaj geedzoj gasto povas tre mal-



helpi, se ĝi tro devigas ilin, ke ili ĝin amuzu (*ĉiam karesas ŝin*). Ĉin timigas la nigra okulego de l' lago, kaj tie ĉi estas tiel agrable en tiu anguleto kun la edzo.

(*Kazimiro elirts jam ĉe unuaj ŝiaj vortoj*).

#### SCENO V.

BRONKA. Enjo, ĉu mi estas tre netolerebla?

EVA (*enpense*). Ne, ne, nur mirigas min tiu subita eksplodiĝo.

BRONKA. Ne pensu pri mi malbone, Enjo!

EVA. Ne. Eĉ tiam...

BRONKA (*kvazaŭ divenante ŝian penson*). Kiam?

EVA. Eĉ tiam, se tiu ŝanĝiĝo, kiu okazis en ci... (*interrompas*). Ĝestu sincera, ci sentas ian nedefineblan timon... eble tio ne estas timo, sed mi jam ne vidas tiun konfidon, kiun ci havis al mi.

BRONKA (*post momento*). Mi estas sincera, mi ĉion malkaŝe al ci diros... Jen ci tiel ŝanĝiĝis...

EVA (*ridetante*). Mi ŝanĝiĝis?

BRONKA. Tiel malfacile estas al mi trovi en ci mian amatan Evan de antaŭ du jaroj. Estas momentoj, kiam al mi ŝajnas, ke tuta eterneco pasis de tiu tempo, kiam ci tiel kore min karesis kaj sentis mian ĝojon, ke Tadeo kun mi edziĝas.

EVA (*malgraŭvole*). Jes, jam pasis tuta eterneco.

BRONKA. Jen, mi rigardas tiel senhelpe kaj timeme sur fundon de tiu eterneco. Jen, ci vidas, tial mi rememoris la nigran okulegon de la lago. (*Eva karesas ŝiajn harojn*). Eble mi iom malvarmiĝis. Eble mi ne estas tute konscia, sed mi sentas la tuŝo de ciaj manoj estas alia, ol antaŭe. Antaŭe ĝi estis, kvazaŭ ci volus min trarbuligi per stigmo de la amo, ĉar ci ja scias, ekzistas ektuŝoj, kiuj brogas, kiel varmegigita fero, kaj nun ĝi estas tia fremda, malproksima... Ci ja scias. Ah, jen: tio estas kvazaŭ aŭtuna sopiro forŝovus la flavan foliaron el kaŝtanaj aleoj.

EVA. Sopiro?

BRONKA. Jes, sopiro! Ah, kiel terurigas min cia sopiro! Ci memoras, kiam ni estis kune en pensiono, mi timis cian pasian kaj jaluzan amon, nun mi timas cian sopiron. Diru al mi, Eva, kial mi devis ĉiam cin timi?

EVA. Aŭskultu min, ci estas incitita, sed mi ĉion en ci komprenas. Mi ne sentas en mi konscie eĉ plej malgrandan ŝanĝon rilate al ci, sed eble mi efektive ŝanĝiĝis... Ci ne plu estas mia... ekskluzive mia, kiel antaŭe... ci amas la edzon, eble nekonsciante ci timas ion nekapteblan... Kaj mi scias (*subite ridas*). Sed eble ci, karulino, estas jaluzo? Nu, kio? Diru al mi sincere.

BRONKA. Ne, ne, mi ne estas jaluzo, sed efektive mi ion timas...

EVA. Kion?

BRONKA. Cian belecon...

EVA. Kion tio signifas?

BRONKA. Kion tio signifas? Ci vidas, la virino povus esti bela, plej bela el ĉiuj virinoj en mondo, kaj mi neniam timus, ĉar mi scias, ke Tadeo eĉ ne ekrigardos tian belecon. Sed ci estas alie bela. Ci vekas sopirojn kaj dezirojn, kiujn oni ne konis. Ci povas alforĝi kaj tiri post ci la homon, ne sciante, ke iu sekvas ciajn paŝojn, kaj li ne scios, kien kondukas lin cia sorĉo... kaj tamen sekvos blinde... antaŭen... ĉiam antaŭen...

EVA. Kaj kien...

BRONKA. Mi ne scias, mi ne scias. Mi ja ĉion ĉi ne komprenas, nur senti tion mi povas. Io disetendas mian animon, diskrevigas la kapon, kaj mi ne scias, kio ĝi estas... (*enpense*). Kazjo diris al mi hodiaŭ, ke ekzistas iu punkto, kie ĉiuj kontraŭ ecoj kunfandiĝas... mi ne memoras bone, kiel li tion diris, sed io tia, ke senfine granda sfero fariĝas plataĵo, kaj mi pensis, ke tiu nigra funelego de la lageto povas profundigi en la senlimon tiel, ke la malsupro kunfandiĝas kun la ĉielo... (*enpense*) Kien? Aŭ en la nigran abismon de l' lago, aŭ supren, supren al majesteco de l' ĉielo...

EVA. De kie venis al ci tiuj pensoj?

BRONKA (*rigardas sin vigle kaj poste ridetas*). Jes, jes, Enjo, mi ne povas nin trovi... (*subite kortuŝe*). Rigardu, rigardu, kiam el miaj

timoj, antaŭsentoj eliĝis io pli luma, kiam mi komencas diveni tion, kio min malkvietigis interne, kaj ne povis eliĝi eksteren, nun mi estas dankema al ci... denove ci ŝajnas al mi pli proksima... Sed strange en mi ankaŭ komencas vekigi ia sopiro... Sed eble mi estas tro malforta, por sopiri? Por povi toleri suferon de sopiro?

EVA. Pri kio ci povas sopiri? Ĉu ankoraŭ ne estas plenumitaj ĉiuj ciaj sopiroj?

BRONKA. Ankoraŭ nun ne.

EVA. Ĉu ci scias kia? ĉu ci ĝin konas?

BRONKA. Ankoraŭ ne, ankoraŭ ne! (*Silento*).

## SCENO VI.

KAZIMIRO (*eniras, maltrankvila, al Bronka*)  
Nu, ĉu jam trankviliĝis mia aminda bofratino?

BRONKA (*subite gajiganta*). Iru for, ci volas denove min inciti. Mi havas jam sufiĉe da cia filozofio, pri la kontraŭecoj, kiuj devas en iu punkto kunfandiĝi.

KAZIMIRO. (*ŝerce*). Ne tre precize ci tion esprimas, sed tamen ci povas observi tiun fakton en ci mem. Antaŭ momento malĝoja, kapricema, nun ci jam estas gaja...

BRONKA. Sed, vere, ne cin mi devas danki por tio, ĉar cia enuanta mieno, povas ekmalesperigi homon!

KAZIMIRO. Atendu, morgaŭ ci vidos ankoraŭ pli enuantan mienon ĉe mi.

BRONKA. Mi tre dankas.

KAZIMIRO (*al Eva*). No, eble nun vi promenos kun mi. Mi devigis Tadeon labori ĉe iu bona afero, pri kiu mi ab solute nenion komprenas.

EVA. Kaj ci, Bronka, forgesu pri ciaj fantazi-  
aĵoj, ripozu, ripozu... *[(cirkaŭprenas Bronkan, kuŝ-  
igas ŝin sur apogsofon kaj kovras per ŝalo).*

BRONKA. Ah, kiel bone estas al mi, kiel bone!

*(Eva kaj Kazimiro eliras).*

### SCENO VII.

BRONKA (*momenton kuŝas, leviĝas malrapide de l'apogsofo, aŭskultas timeme, poste elprenas leteron el korsaĵo, rigardas ĝin, kisas, kovras vizaĝon per la letero kaj ploras mallaŭte*).  
Tadzjo, sola mia Tadzjo!

*(Fino de l' dua akto).*

## AKTO III.

### SCENO I.

BRONKA — TADEO.

*(Tra la hele lumigitaj fenestroj estas videble, kiel oni iras malrapide tra la vitra oranĝerio en la salonon. Frua mateno. La suno ruĝigas la neĝon post la fenestroj. Bronka eniras unua, apogas sin je la apogsofo).*

BRONKA. Nenie, nenie mi povas trovi trankvilon... Nenie, nenie. Kaj mi tiel volis alpremi min al ci kaj trovi kvietiĝon apud ci... Tadzjo — Tadzjo... Kio kun ni okazis?

TADEO. Sed, kara, amata infano... Ĉu ci ne povas kompreni, ke ci estas ekscitita? Ĉu ci jam forgesis, kiel ci ploris, kiam mi estis por unu semajno forveturanta de ci?

BRONKA. Ho, ne, ne. Tiam estis alia afero... Tiam estis nur bedaŭro de trodorlotita virino, kaj timo de tiu terura sopiro, kiam mi cin dum tuta semajno, pensu nur, dum tuta semajno mi ne vidos cin apud mi.

TADEO. Kaj nun, kio do estas nun? Mi ja estas apud ci, tage kaj nokte mi estas apud ci.

BRONKA. Kaj cia animo kie vagas?

TADEO. Mia animo? (*serioze*) Ĉiam apud ci.

BRONKA (*subite*). Apud mi? Diru al mi ankaŭ unu fojon, ke ĉiam, ĉiam cia animo estas apud mi.

TADEO (*forte*). Ĉiam! (*li paŝas laŭlonge kaj laŭlarĝe en la ĉambro, profunden enpensiĝinta, Bronka observas liajn movojn*).

BRONKA. Ĉiam apud mi?

TADEO. Mi diras al ci sincere, ke antaŭe mi ankaŭ sentis ofte tian grandan sopiron, kiu ŝiradis al mi la koron kaj la cerbon...

BRONKA (*interrompas subite*). Sopiron! Ci ankaŭ sentis la sopiron. Pri kio, pri kio ci sopiris?

TADEO. Trankviliĝu, Bronjo, ci ja scias tre bone, kiel mi amas cin. Pri nenio mi povis sopiri krom...

BRONKA (*kun ekkrio*) Krom... diru al mi!

TADEO (*karesas ŝin*). Krom... pri sopiro...

BRONKA (*leviĝas*). Kio? sopiri pri sopiro!! Kion tio signifas?

TADEO. Ne estu nur tia terurita. Permesu do trankvile kun ci paroli... Sidiĝu, Bronjo, sidiĝu mia amegata, mi ĉion rakontos al ci... sopiri pri sopiro...

hm... hm... Jen, ci imagu, kiam mi estis juna, mi ŝiris la teron pro sopiro, mi ne sciis, kion fari, ĉar mi sopiris plenumi ion tiel grandan, potencan kaj belan, kion ĝis nun neniu plenumis...

BRONKA. Eble mi al ci malhelpis?

TADEO. Ne, ne, Bronka, ne. Tio estis antaŭ tre longe... Mi sentis en mi tian grandegan forton, ke ŝajnis al mi, ke tutan mondon mi el mi eligos... Ha... ha... ha... Mi avide studis la sciencon, mi traserĉadis la antikvajn balaĵojn de la homa scio, tra la tuta mondo mi vojaĝis por plenumi la leĝon skribitan en mia animo, por krei ian grandan agon...

BRONKA. Kaj mi, mizera virino malhelpis al ci?

TADEO. Ho ne, centfoje ne — tio estas tute alia afero. Kazimiro kaj mi, ni estas la lastaj el nia familio... Kazimiro ne konis... Mi nenion scias pri Kazimiro... (*Momento de silento*).

BRONKA. Parolu, parolu plu.

TADEO. Nenion pli mi havas por diri.

BRONKA. Tadzjo! Ĉu apud mi ci perdis la sopiron?

TADEO. Ci vidas — kiel mi devas respondi al cia demando? Mi (*balbutante*) eksentis subite en mi tian senfortecon, mi estis laca, rezigninta — kaj mi sentis tian grandegan deziron de trankvilo, kvietiĝo...

BRONKA. Mi estis do nur la surda kuseno por cia lacigita kapo?

TADEO. (*malgaje*). Kial ci, Bronka, min tiel atakas?

BRONKA. Mi cin ne atakas, sed en mi ĉio ribelas, kiam mi pensas, ke ĝis nun mi estis nur cia ludilo, cia kamaradino, kun kiu estis tiel agrable babili en ĉi tiu infera, malbenita angulo ĉe la kameno...

TADEO. Trankviliĝu, Bronka, trankviliĝu. Kial ci ne povas aŭskulti trankvile tion, kion mi al ci diras. Mi ja nenion pli volis diri al ci krom tio, ke apud ci mi retrovis la trankvilon kaj feliĉon, ke apud ci mi forgesis sopiri, ĉar ci povis kontentigi ĉiun mian sopiron.

BRONKA (*rigardas lin longe kaj kaptas lin je la manoj*). Kaj kial ci eksopiris pri cia sopiro?

TADEO (*kun kvieta rideto*). Kial ci nun sopiras pri tio, ke ci neniam antaŭe sopiris? (*Silento*).

BRONKA (*enpense*). Jes vere — (*post momento*). Ci demandis min antaŭ momento, kial mi nun estas tia malgaja kaj ekscitita, nun, kiam ci revenis tia forta, tia feliĉa, kaj tia terure sopiranta... al cia Eva!

TADEO (*terurita*). Eva?

BRONKA (*ne plu detenante sin*). Eva! Eva! Jes Eva! Ci pensas, ke mi ne vidis, kiel ci ekstremis, kiel ci teruriĝis, kiam ŝi ekstaris tie, sur la sojlo de nia domo? Ci pensas, ke mi ekzistas nur por esti cia ludilo, kuseno por cia laca kapo, kaj ne senti, ne

senti tiun teruran sopiron, kiu cin forrabas de mi!? (*skuas lin, sed subite defalas senforte kaj rigardas lin mirigite kaj preskaŭ senkonscie*). Tadzjo, pardonu, ŝajnas al mi, ke mi cin riproĉis pri cia sopiro... ci scias, tio estas maljustaj riproĉoj, ĉar mia sopiro ankaŭ foriris malproksimen de ci.

TADEO (*mistere*). Bronka, al kio?

BRONKA (*kun forta eksplodo*). Al Eva, al Eva, al Eva!

TADEO (*mistere*). Do ŝi ankaŭ cin infektis?

BRONKA (*defalante*). Jes, ankaŭ min...

## SCENO II.

(*Kazimiro eniras, rigardas mirigita*).

KAZIMIRO. Vi jam leviĝis? Kial do tiel frue?

TADEO (*penante esti trankvila*). Ĝuste mi volis cin demandi: Ci jam leviĝis? Kial do tiel frue?

KAZIMIRO. Hm, mi legis tutan nokton, poste mi volis refreŝiĝi, mi iris promeni. Revenante el la parko mi ekvidis kun miro lumon en la fenestroj de l' salono, mi eniris por vidi, kio eksterordinara ĉi tie okazis, kaj nun mi iros dormi.

BRONKA. Nenio okazis. Kio povus okazi? Nur tiuj viaj problemoj pri la celo de l' vivo, pri eligo el si mem, pri serĉado de io nekaptebla kaj eble tute ne ekzistanta, tiel min maldormigis kaj ekscitis, ke mi tute ne permesis al Tadeo dormi.

TADEO (*zorgeme*). Kaj eble, Bronjo, ci nun iros dormi? (*li kisas ŝian manon*). Iru, iru, Bronjo, kuŝiĝu; jen mi ankaŭ ripozos.

BRONKA (*vive*). Ne, ne... kaj ci Kazjo, ankaŭ restu, restu. Al ni estas tiel bone kun ci...

KAZIMIRO (*kun nenatura rido*). Ĉu ci aŭdas, Tadeo? Nun kiam ci ĉeestas, al Bronka estas bone kun mi, nun mi estas la ŝirmilo, aŭ oportuna mebl-ajo, kiu diskrete mem sin forigas, kiu scias, kiam ĝi devas eniri, kiam malaperi...

BRONKA. Ci, sentaŭgulo.

KAZIMIRO (*al Tadeo*). Kaj kiam ci forestos, ŝi diris, ke mi estas netolerebla, ke mi kreis en cia domo atmosferon de enuo kaj laco, kaj ĉiumomente ŝi kuradis veki fraŭlinon Eva...

BRONKA (*subite. ŝajnigante miron*). Jen, Tadeo, tio estas tute nekomprenbla. Tutan tempon dum cia foresto, Eva malsanis je senĉesa dormemo, tutan tagon ŝi dormis.

TADEO (*distrita*) Ŝi dormis?... Tutan tagon ŝi dormis? Hm.: (*li leviĝas, paŝas laŭlonge kaj laŭlarĝe tra la ĉambro*). Aŭskultu do, Kazjo, tiu bona afero estas efektive tre komplikita. Mi pensas kaj pensas senĉese, aŭ mankas iaj dokumentoj, aŭ la kalkuloj ne konsentas (*gaje*). Aŭdu, Bronka, vestu cin, ordonu prepari matenmanĝon, jungigu glitveturilon kaj poste kun tuta ĉevalrapideco, tra la kampoj, tra l' arbaroj...

BRONKA. Jes, jes... tra kampoj, tra arbaroj—ah, kiel bela tio estas (*per movo ŝi malligas la harojn*), kaj en tiu vento, en tiu kuro, miaj haroj, rigardu, jen tiel (*ŝi dismetas siajn harojn, denove kunligas ilin rapide, saltleviĝas*) kaj tiel per tuta brusto enspiri, ensorbi en sin tiun abismon lazuran, kiu estas antaŭ ni (*ŝi spiras profunde kaj etendas la brakojn... subite kun petola rideto al Tadeo*). Rigardu nur, kiel mirigita estas Kazimiro, li pensis, ke mi tute ne scias sopiri pri blovegado de l' vento, pri lazura abismo...

KAZIMIRO. Sed kontraŭe, ne mirigite mi rigardis, mi nur envias al homoj, kiuj ankoraŭ scias sopiri pri io.

BRONKA. Ci aŭdas, Tadzjo? Ah, kia naiva li estas, li envias al homoj, kiuj sopiras. Nu, sed iru, Tadzjo, iru aranĝi tiun aferon, tio kredeble ne longe daŭros.

TADEO. Plej longe—duonon da horo.

BRONKA (*nenature*). Kaj mi dume instruos Kazjon sopiri.

TADEO. Bona ideo, bona ideo (*eliras*).

### SCENO III.

(*Bronka—Kazimiro*)

BRONKA (*aliras al la kurtenoj de l' pordo, tra kiu eliris Tadeo, ĉirkaŭrigardas, poste aliras al Kazimiro kaj kaptas lian manon*).

Ĉu ci scias, kien li nun iris?

KAZIMIRO. Mi scias.

BRONKA. Ci scias? Ci ne povas tion scii. Ĉu ci pensas, ke li iris aranĝi ciajn aferojn?

KAZIMIRO. Mi scias, ke ne.

BRONKA (*forte*). Al Eva li iris, al Eva, al Eva! (*Silento*). Ĉu tiel devas esti?

KAZIMIRO. Ha, tia estas homa sorto. Kiam la homon ekkaptos tia terura dezirego eliĝi el mem kaj el ĉio, kiam nenia feliĉo, nenia ĝuo plenigas la animon, tiam la homo ne estas kapabla kvietigi sian internan maltrankvilon, bridu tiun furiozan impeton, kiu lin pelas, pelas kaj pelas blinde sur kadavroj, sur viktimoj de liaj krimoj, ĉiam antaŭen...

BRONKA (*timigita*). Tio estas pli forta ol huragano, kiu elŝiras kun radikoj jarcentajn kverkojn?

KAZIMIRO. Pli forta.

BRONKA. Nevenkebla?

KAZIMIRO. Ne.

BRONKA (*mistere*). Sed pli forta. ol Eva, ĉu ne vere?

KAZIMIRO (*skuas la kapon*). Ve—ne.

BRONKA (*saltleviĝas*). Ne, ci diras, ne (*mal-esperigita*). Diru al mi, kial ne, kial ne?

KAZIMIRO. Ĉar Eva mem estas tiu sopiro. Li ne pri ŝi sopiras, li ŝin eble tute ne vidas, nenion

scias pri ŝi, sed tio estas, kvazaŭ ŝi estus en li, kvazaŭ ŝi lin ŝirus, vipinstigus al iu terura persekuto.

BRONKA. De kio, diru al mi, de kio?

KAZIMIRO. Tion neniu scias, nek sciis, neniu komprenis, nek iam komprenos. (*Silento*).

BRONKA. Kion do mi malfeliĉa faros? Oh, mi ankaŭ sopiras, mi ankaŭ sopiras, sed pria lia animo. Dio kara, kia blinda mi estis, kiel blindiĝis mia animo pro tia pasio, kaj nur nun mi ekkomprenis, ke li neniam al mi apartenis.

KAZIMIRO (*malgaje*). Aŭskultu, Bronka, mi ne volis fari tiun operacion kun la okuloj de cia animo. Mi bone sciis kaj komprenis, ke li neniam al ci apartenis, tial mi estis malgaja. Sed profundan malgajon mi kaŝis sub la masko de enuo kaj indiferenteco; cetere tio ne ĉiam al mi prosperis; sed mi pensis, ke la nuboj malaperos...

BRONKA, Kial ci ne diris tion al mi, kial ci tion tuj al mi ne diris? Mi havus tempon por trankviliĝi, kaj tio nun falis sur min subite, kiel tondro. Mia animo estas, kiel frakasita de tondrekato saliko, mil ŝtupoj kuŝas ĉirkaŭ la radikoj eligantaj el tero. Kial ci ne diris al mi? Kial ci ne malfermis miajn okulojn?

KAZIMIRO. Aŭskultu min, Bronka, trankvile, ci tuj komprenos, kial.

BRONKA. Kia stranga ci estas, Kazjo, kio kun ci okazis?

KAZIMIRO. Kio kun mi okazis? Do ci ankaŭ nur nun ekvidis tion, kion ci de unu semajno devis scii?

BRONKA (*malkuraĝe rigardas lin per timaj okuloj*).

KAZIMIRO. Ne timu, Bronka, estas nenio terura... Mi diros al ci simple kaj sincere. Malrapide dum longaj semajnoj mi ekamis cin per mia unua amo, ĉar mi, Bronka, neniam ĝis nun amis. Kaj mia animo estis malvarma, blanka kaj pura, kiel la neĝo, tie sur kampo. Kial mi cin ekamis, kial mia amo ĉiuhore profundigis kaj ĉiam pli forte kreskas en mi, tion vi eble komprenis el tio, kion mi al ci diris pri mi. Cetere tio estas tute indiferenta... (*rigardas ŝin kun koreta rideto*) nur ne estu tia terurita. Ci povus kun teruro forkuri el la ĉambro, ve mi esperus pri cia reciprokeco, sed mi nek esperas pri ĝi, nek ĝin deziras. Eĉ se mi scius, ke ci min amos reciproke, mi ne hezitus eĉ momenton forpuŝi kun abomeno cian amon. Ne pro tio, ke ci estas mia bofratino, sed ĉar cia animo sin kuntuŝis kun la alia, eble pli forta, ol la mia.

BRONKA. Silentu, Kazjo, mi cin ne komprenas.

KAZIMIRO (*lacigita*). Tio tute ne malhelpas, mi povas pensi tagon kaj nokton pri ci, ami cin kaj mi scias ne pensi pri tio, ke ci estas edzino de mia frato; mi scias eĉ por momento, eĉ per plej malproksima penso ne makuli cian dignecon de sinjorino de la domo de miaj prapatroj kaj de edzino de mia frato, kiun mi amas same, kiel ci.

BRONKA (*aliras al li kaj karesas kviete liajn harojn*). Jam ne parolu pri tio, ne parolu.

KAZIMIRO. Kompreneble, mi ne plu parolos al ci pri mia amo. Sed ĉu ci komprenas la sopiron de homo, kiu vivis pliparte en malklaraj, malpurajoj he l' vivo, en iu marĉo, kiun oni nomas lumo kaj vivo? Mi ekdeziregis kapti tiun vaglumon, kiu ŝvebas super la marĉo kaj kotejo de l' vivo, mi volis eksenti tiun ĝuon, kiam mi eldiros la vorton „mi amas“. (*Silento, ili tenas sin reciproke je manoj, sidante una apud la alia. Post longa paŭzo.*)

KAZIMIRO. Mi ĝojas, ke mi tiel bele plenumis konton kun mia tuta vivo... Sola mia zorgo, sola terura sufero nun estas la demando: kiel ci tion eltenos?

KAZIMIRO. Aŭskultu, Bronka, kun ĝojo mi rigardis, kiel homo en ci dum lastaj tagoj kreskis kaj potenciĝis, kiel ci luktis kun ci, kun kia terura peno ci komencis konsciiĝi pri ĉio, kio dormis sur fundo de nia animo. Mi ĝojis jam ne kiel homo amanta, sed kiel artisto, kiam ci kreis novajn vortojn por esprimi ĉion, kion naskis cia animo en tiuj suferoj... Bronka, estu forta kaj bela, kaptu en aero ĝustatempe la bastonegon dispremontan al ci la kapon.

BRONKA (*iritita*). Kio povus min dispremi?

KAZIMIRO (*severo*). Tadeo al ci ne apartenis kaj ne apartenos. Lia animo forflugos, se ci volas havi apud ci kadavron, do havu.



BRONKA. Ci mensogas.

KAZIMIRO (*malgaje*). Se mi ne malŝatus cian amon eble tiam mi uzus tiajn mizerajn rimedojn; se mi ne amus cin, se estus en mi alia sango, ol la nun fluanta, tiam mi eble ĝojus, ke mi povas vundi cian koron. Mi tion al ci ne diris, kvankam mi sciis pri ĉio, kaj nun kiam nenio jam estas ŝanĝebla, mi volas hardi cian animon...

BRONKA (*rigardas duonsenkonscie Kazimiron*). Do bone! Mi estos nun forta, mi estos bela. Sed ci, ci ja al mi helpos?

KAZIMIRO. Kiel mi povas al ci helpi?

BRONKA (*kun obtuza ekkrio*). Mi ŝin mortigos, mortigos, mortigos! Kaj ci al mi helpos!

KAZIMIRO. Mi — ne.

BRONKA (*ridas malestime*). Kaj ci, ci diris ke ci min amas? Kaj ci, laŭ kies vortoj mi sentis, ke ci estas kapabla por mi ĉion fari, kaj ĉion oferi al mi, nun ci rifuzas ĉion?

KAZIMIRO. Tute ne, mi nur ne komprenas, kial mi devus helpi al tia sencela kaj senidea krimo, al kio instigi povus nur ia frenezo sed neniam vera forto kaj beleco de virino.

BRONKA (*ĉiam pli pasie*). Homo, kion ci diras, ĉu ci ne havas koron nek sangon? Diru, kiel ci amas, per kio ci amas? Cia amo estas do nenio alia, al sin karesado per sono de belaj vortoj, kaj nenio alia, al nur ĝuo de sonĝaj revaĵoj kaj fantazioj.

KAZIMIRO (*rigardas ŝin longe*). Freneza doloro parolas per cia buŝo. Cetere ci estas prava — mi estas nekapabla, aŭ eble tro forta por ĝia sangavida amo, por ĝia sangavida krimo... (*li leviĝas kaj malrapide iras al la pordo*. Bronka lin rigardas, poste alkuras al li kaptas lin je la mano kaj retiras en la ĉambron).

BRONKA. Ne foriru, ne foriru, mia sola frato. Vidu, mi jam rekonsciiĝis. Ci, ci sola ekparolis al mia animo. Ci vidas, mi ankaŭ havas animon, Kazjo, tre lacigitan animon, sed sufiĉe grandan por kompreni tutan belon kaj benecon de ciaj paroloj, por doni lokon al parteto almenaŭ de cia malgajo kaj sopiro. Ĉar, diru malkaŝe, Kazjo, ci ankaŭ sopiras.

KAZIMIRO. Nun ne, nun ne. Per ci penum-iĝis en mi la sopiro.

BRONKA (*ripetas senpense*). Per mi... per mi... per mi... (*subite gajiĝas*) Kazjo, ĉu ci vere diris al mi, ke ci min amas?

KAZIMIRO (*enpense*). Mi diris.

BRONKA. Kaj ci diris, ke ci min malestimus, se mi cin reciproke amus?

KAZIMIRO. Mi diris.

BRONKA. Kaj ci diris, ke ci estas tro fiera, tro pura por makuli eĉ per plej malforta avida penso la sinjorinon de l' domo de ciaj prapatroj kaj edzinon de cia frato?

KAZIMIRO. Mi diris — kaj tio estas la tuta enhavo de mia animo.

BRONKA (*kaptas lin subite je la manoj*). Oh, ci mia frato (*subite ĉirkaŭprenas lian kolon, al premas lian kapon al sia brusto, poste kliniĝas al la brako de Kazimiro kvazaŭ dormeme*). Tiel laciĝis mia animo, tia dormema mi estas, mi tiel volas, ke ci lulu min, lulu senfine, ĝis la kvieta eterna dormo, ĉar ci estas tiel senlime, senlime bona... (*subite saltleviĝas*). Kazjo, ĉu ci scias, kio mi estas?

KAZIMIRO. Mi scias.

BRONKA. Diru, diru al mi, kio mi estas!

KAZIMIRO, La blanka, pura neĝo, kiu surŝutas la frostiĝintan teron, kovras, vartigas tiun kadavron, ĝis kiam ĝi komencas reviviĝi kaj ellasi el la varma jam brusto, el grajnoj, ŝajne jam frostiĝintaj, novajn, freŝajn ĝermojn...

BRONKA (*mediteme*). Kaj ŝajnis, ke la grajno semita en la teron delonge jam frostiĝis.

KAZIMIRO. Frostiĝis dum malvarmeĝo, putriĝis en koto...

BRONKA. La grajno ĝermas, kaj la neĝo degelas... Ci estas prava—mi estas neĝo (*subite saltleviĝas*). Kial Eva ne dormas? Ci aŭdas?

(*Kazimiro aŭskultas*).

BRONKA. Ci aŭdas? Nun ŝi malsupreniras laŭ la ŝtuparo... Post momento ŝi estos ĉi tie (*su-*

*bite fariĝas nenature gaja*). Ah, Kazjo, mi estas tre gaja kaj feliĉa (*ĉirkaŭprenas lin per la brakoj, penas klini lin jen en tiun jen en alian flankon*). Lu- lu, lu- lu, mia malgrandulo, lu- lu... Nu, dormu fine, malobeema infano (*sur la sojlo aperas Eva kaj rigardas, laŭŝajne amuzita, la scenon*).

#### SCENO IV.

BRONKA (*rigardas ŝin*). Lu- lu, lu- lu, mia malgrandulo, Nu, se ci ne volas dormi, diru almenaŭ al fraŭlino Eva: bonan matenon!

KAZIMIRO (*kun nenatura gajeco*). Bonan matenon, fraŭlino.

BRONKA (*salutas Evan*). Pensu nur, Enjo, kiel frue ni ĉiuj hodiaŭ leviĝis. Al mi ŝajnas, ke nun estas tago de Kristnasko. Ĉe ni estis kutimo, ke tiun tagon oni memorigis al infanoj per vergoj, tial ni leviĝis el la litoj kiel eble plej frue.

EVA. Sed, pro Dio, tio ja estis antaŭ paska vendredo aŭ sabato.

BRONKA. Eh, tute egale... Rigardu nur mian grandan, mildan, bonan urson. Ah, tiu bonkora Kazimirego...

KAZIMIRO. Bronka vekigi hodiaŭ en bonega humoro.

BRONKA. Ci estas prava... al mi ŝajnas, ke mi estas juna infano kiam mi grimpis ankoraŭ nur la plej altajn suprojn de la popoloj super tiu malbenita nigra lago.

EVA. Denove la nigra lago?

BRONKA. (*svingas per la mano*). Eh—tute egale. Lago aŭ ne lago, razilo aŭ pendigilo, sub la radoj de vagonaro aŭ per plej imitinda maniero en propra liteto... la morto restas morto. Tute egale kiel kaj kiam... (*subite interrompas*). Vidu nur, Enjo, tiu bonkora Kazimirego aspektas, kiel dubranĉega popolo, ah ne, kiel mia grandega onklo, sur kies ŝultroj mi tiel ofte skuadís al mi la intestojn.

EVA. Kial ci estas tiel gaja?

BRONKA (*kaptas sin je la manoj karese*). Ci vidas, Enjo, mi ofte havas tiajn stultajn malgajojn, sopirojn, per kiuj mi venenas la vivon al mi mem kaj aliaj. Sed ĉio-ĉi forpasas, kaj tiam mi estas duoble gaja... (*iom lacigita*). Sed vidu nur, tiu Kazimiro por nenio taŭgas. Ah, kia teda ci estas, Kazjo, kia teda... Jen kio, Eva, eble ni ambaŭ nun forkuru en la ĝardenon. La neĝo estas profunda — ĝis la zono... Ah, kia plezurego estas vadi en tiu neĝo, disŝiri ĝin per la brusto kaj piedoj, por ke pli baldaŭ ekĝermu tiu morta, sed jam varmigita greno...

EVA (*ŝajnigas, ke ŝi ne atentis, indulgeme*). Bronka denove frenezas. Nun en la neĝon, en matena robo, en pantofletoj?

BRONKA. Nu do kio? Mi estas hardita. Kaj ci ja estas vestita... Venu, kara Enjo, ci estas tia malvarma, ci tiel frostas, kaj mi cin varmigis. Per neĝbuloj mi frotos cian vizaĝon, mi lavos per la neĝo ciajn harojn, ah, se ci scius kiel neĝo povas ĉirkaŭpreni, karesi, varmigi la malvarmajn manojn kaj frostiĝintan koron...

EVA. Ne, Bronka, (*ĉiamkun la sama mistera rideto*) mi ne bezonas la neĝon, mi sentas min bone kun miaj malvarmaj manoj kaj frostiĝinta koro. Mia animo neniam ankoraŭ bezonis, ke la neĝo ĝin kovru por ĝin varmigi.

BRONKA (*rigardas sin longe*). Ne? Ĉu vere ne?.. Nu, do venu, Kazjo, ni kune flugos en la neĝon; ĉu ci permesos ruliĝi en la neĝo? Mi faros el ci belegan neĝidolon (*montras per gestoj*). Ĉi tien mi metos al ci du karbojn—ci havos la okulojn, ĉi tien mi metos pecon da koto—ci havos la nazon, poste mi faros tiel, ci havos la buŝon, mi metos al ĝi en la buŝon tian pipon... Ah, Enjo, Enjo, kial ci ne volas kun ni iri.

Nu, venu, Kazjo, venu (*tiras kun si Kazimiron*). Enjo, Tadeo tuj venos ĉi tien (*forkuras en la antaŭcambron kune kun Kazimiro*).

*Voĉo de Bronka (el antaŭĉambro)* Tadeo, Tadeo! Eva restis sola. Vi preparu al ni matenmanĝon.

## SCENO V.

(*Eva sola — aliras al la fenestro, rigardas dum momento, frapante per la fingroj la vitrojn,*

*malvarma kaj severa aliras al la kameno disfosas per la hoketo la brulaĵon poste sidiĝas; senmove rigardas en la fajron).*

#### SCENO VI.

TADEO (*eniras, ĉirkaŭrigardas, aliras al Eva, prenas fotelon kaj sidiĝas apude*).

Ĉu diri al ci bonan tagon?

(*Eva silentas*).

TADEO. Ĉu demandi cin, kiu min vokis?

EVA (*levas dormeme la kapon*). Bronka cin vokis. Ŝi kuris en matena robo kaj pantofletoj ludi kun Kazimiro en la neĝo... Ŝi diris, ke estas bele vadi en la neĝo ĝis la zono, disŝiri per sia brusto la ondojn de la neĝo... Ĉu ci ne timas, ke ŝi malvarmumos?

TADEO (*kvazaŭ sonĝante*). Tute egale.

EVA. Ĉu ci ne estas ĵaluza pri Kazimiro? (*Tadeo ŝin rigardas, sed nenion respondas*).

EVA. Kie ci nun estis?

TADEO. Kun mi mem.

EVA. Apud mi, kun mi?

TADEO (*furioze*). Ne, mi diras al ci: mi estis kun mi mem.

EVA (*karesas liajn manojn*). Kial ci furiozas, ke de nun ci jam por ĉiam devas resti kun mi kaj esti eterne kun mi.

TADEO. Esti kun ci? Apud ci? La morto estas centfoje pli agrabla al mi.

EVA (*enpense*). Kiam mi eniris en cian domon ah, ne, ne, ne pri tio mi volis paroli. Jes, tiu momento... Tio estis nur unu momento... Kiam ci revenis, kaj mi staris en tiu ĉambro, mi ne aŭdis pri kio vi interparolis, sed mi sentis, ke vi estas feliĉaj, tiam mi ekhezitis por momento, antaŭ ol eniri la sanktejon de via feliĉo kaj trankvilo.

TADEO (*kvazaŭ vekiginte*). Kie estas Bronka?

EVA. Bronka foriris mem, propravole displugi la neĝon, por ke la greno semita en la frostiĝinta bedo de cia animo povu pli rapide ĝermi.

TADEO (*hezilas, rigardas ŝin, rigardas en la fajron, poste ŝubite*). Kion do ci volas?

EVA (*severe*). Kion? Ci ankoraŭ ne scias, kion?

(*Momento de silento*).

TADEO. Tio neniam fariĝos! (*furioze*). Antaŭe mi frakasus al ci la kapon, antaŭe mi cin dispremus, kiel vermon, al mi mem disbatus la kapon pro sopiro al ci, furioza satano, ol mi permesus, ke tio fariĝu.

EVA (*ravila rigardas lin*). Kia bela ci estas, ke ci min amas kun tia terura forto.

TADEO (*kaptas ŝiajn manojn*). Mi cin mal-amegas.

EVA. Mi scias pri tio kaj des pli miamas cian amon.

TADEO. Mi ne malkonfesas mian amon, mi ne malkonfesas mian teruran, teruran sopiron al ci, sed tiun oferon mi al ci ne faros, kaj tio, mi al ci ĵuras, neniam fariĝos.

EVA. Ĝi devas fariĝi.

TADEO (*terurita, kun obtuza ekkrio*). Ankorau unu fojon mi ripetas, neniam, neniam.

EVA (*senmova, kun larĝe malfermitaj okuloj*). Ankoraŭ hodiaŭ tio okazos.

(*Oni aŭdas bruon en la koridoro, du disputantaj voĉoj*).

TADEO (*aŭskultas*). Kion tio signifas? (*sonorigas*).

(*Post momento eniras lakeo*).

### SCENO VII.

TADEO. Kia bruo kaj disputo tie estas?

LAKEO. Sinjoro, venis ia virino kaj volas nepre vidi la sinjorinon.

TADEO. Kial ci ne ordonis enlasi ŝin en la kuirejon, por ke ŝi tie atendu?

LAKEO. Mi al ŝi diris, sed ŝi ne volas iri en la kuirejon; ŝi diras, ke ŝi havas saman rajton al la sinjorino, kiel patrino mem.

TADEO (*frotas la frunton*). Enlasu ŝin.

(*Lakeo eliras — Paŭzo*).

### SCENO VIII.

*Eniras fremda virino, malserena, ĉirkaŭrigardas, poste parolas trankvile sen plej malgranda humileco.*

MAKRINA. Oni ne volis enlasi min ĉi tien, oni ordonis al mi atendi en la kuirejo; Sed mi rajtas eniri tra la sama pordo, tra kiu en vian domon eniras sinjoroj kaj sinjorinoj, kaj eĉ plej grandaj potenculoj de tiu ĉi mondo.

TADEO (*aliras terurita al ŝi*). Kion tio signifas?

EVA (*turnita dorse al Tadeo kaj Makrina eksplodas subite per rido*).

TADEO (*ne aŭdante la ridon de Eva, kaptas la manon de Makrina kun ĉiam pli granda timo*). Diru fine, kion tio signifas.

MAKRINA (*montras per la fingro Evan kaj diras tre trankvile kaj serioze*). Mi konas tiun

sinjorinon, kaj ŝi ankaŭ min bone konas. (*Eva ĉesas ridi, subite turnas sin al ŝi, kaj ili esploras sin reciproke per la rigardo*). Vi permesos, sinjoro, ke mi sidiĝu ĉi tie, en angulo kaj atendu alvenon de mia sinjorino, via edzino, — tiu plej kara mia infano, kiun mi vartis kaj edukis. (*Ŝi sidiĝas en angulo apud la pordo, Tadeo reiras al Eva, sed Eva denove turnita al kameno, ne vidas lin. Subite enkuras Bronka, tuta neĝkovrita, ĵetas sin al Tadeo kaj tutforte ĉirkaŭprenas lin per la brakoj*).

#### SCENO IX.

BRONKA. Varmigu min, Tadzjo. En la fajron min metu, mi tremas per tuta korpo. Tadzjo, varmigu min.

TADEO (*liberigas sin de ŝia ĉirkaŭpreno*).  
Cia vartistino venis.

BRONKA (*forsaltas terurita de Tadeo, ĉirkaŭrigardas, subite ekvidas la virinon, kiu leviĝis de sia loko, ĵetas sin al ŝi*). Ci, mia sola, ci, mia patrino amata! Ah kiel bone estas, ke ci venis! Ah kiel bone, ke ci estas ĉi tie!

Fino de la tria akto.

#### AKTO IV.

#### SCENO I.

(*Post la fenestroj blankiĝas la neĝo en posttagmeza krepusko de malfrua vintro, sur la scenojn eniras malrapide Bronka dolora kaj kvazaŭ senkonsciigita de sufero, ŝi tenas en la mano ĉifitan leteron, aliras al fenestro, rigardas longe en la parkon, poste malvolvas la leteron, karesas ĝin per la manoj kaj legas turnita dorso al rigardantoj*).

BRONKA (*mallaŭte frustrante legas*). „Mia sola, amegata Bronka...“ (*mallevas la leteron kaj ploretas*); sola Bronka, ho Dio... Ah jes, jes — sola. Vere, vere, sola, sola en la tuta mondo... Ah! Makrina, Makrina! (ŝi sonorigas, rigardas vage antaŭ si). Makrina, vartistino — la fratino ankaŭ ŝi vartis, poste metis ŝin en la ĉerketon... Oh la lago, tiu nigra lago...

#### SCENO II.

LAKEO (*eniras*). Ĉu sinjorino sonorigis?

BRONKA. Jes, ordonu, ke oni forbalau la neĝon de la lago.

LAKEO (*staras kaj silentas*).

BRONKA (*malpacience*). Kion ci atendas?

LAKEO. Sinjorino, antaŭ kelkaj horoj estis terura neĝblovado, kaj la neĝo kuŝas profunda je unu metro, la laboro daŭros kelkajn horojn.

BRONKA (*malpacience*). Kion tio signifas? Kunvoku ĉiujn vilaĝanojn, la lageto devas esti pura, kiel vitro, ordonu elhaki truojn en la glacio, alvoku fiŝkaptiston, ordonu pretigi torĉojn hodiaŭ estos fiŝkaptado.

LAKEO. Mi faros, kiel vi ordonis, sinjorino.

BRONKA (*tre iritita*). Sed tio devas esti tuj farita, tuj, tuj!

LAKEO (*kliniĝas kaj volas eliri*).

BRONKA. Kie estas sinjoro Kazimiro?

LAKEO. Li sin enŝlosis en sia ĉambro kaj ordonis diri...

BRONKA. Kion li ordonis diri?

LAKEO. Ke li jam hodiaŭ ne malsupreniros, ĉar li devas labori.

BRONKA. Je-es? Do petu lin, ke li bonvolu veni ĉi tien post momento.

LAKEO (*kliniĝas kaj denove volas foriri*).

BRONKA (*subite konfuzita*). Ĉu ci vidis la sinjoron?

LAKEO. La Sinjoro foriris antaŭ momento arbaron.

BRONKA (*maltrankvile*). Sola?

LAKEO. Ne, kun la sinjorino, kiu estas ĉe ni.

BRONKA (*rigardas lin*). Aha, nu, bone... (*enpense*). Petu Makrinan, ke ŝi venu al mi, sed memoru, ke oni plej baldaŭ forbalau la neĝon de l'lago kaj pretigu torĉojn, kaj Makrinan petu, ke ŝi tuj venu.

(*Lakeo foriras*).

### SCENO III.

BRONKA (*sola, kaptas sin je la kapo kaj paŝas tra la ĉambro*). Sola, sola, sola... Li foriris kun Eva... Kazjo sin enŝlosis... en la tuta domo Makrina kaj mi... ha... ha... ha... (*paŝas tra la ĉambro*). Antaŭ du tagoj mi estis lia sola, sola, kaj nun, kaj nun... (*denove malvolvas la leteron kaj mallaŭte legas*) „apenaŭ pasis unu semajno, kaj mi tiel terure sopiras al ci, tiel cin deziregas...“ (*jetas la leteron teren*) mensogo! mensogo! (*post momento de pripenso ŝi kliniĝas kaj levas la leteron, kisas ĝin*). Ne, ne, tio ne estas mensogo (*karezas la leteron, sidigas sur tapiŝon*). Tiel Dio volis, tiel Dio volis...

#### SCENO IV.

(*Eniras Makrina kaj staras silente apud la pordo*).

BRONKA (*ne vidante Makrinan kun rezignacio*). Tiel volis Dio.

(*Silento*).

BRONKA (*subite saltleviĝas terurita*). Kiu estas ĉi tie? (*subite ekvidis Makrinan*). Ah, estas ci, Makrina, bone, bone, ke ci venis (*Aliras al ŝi, prenas ŝin je la mano kaj sidigas apud si*). Tre bone estas, ke ci venis, Makrina, tre bone... (*Subite rigardas vigle Makrinan*). Diru nur al mi de kie venis al ci subite la penso, iri tiom da tagoj dum tia neĝblovado, dum tia frosto, por min viziti? Tiom da jaroj ci tute ne pensis viziti tiun infanon, por kiu de la momento de ĝia orfiĝo, ci estis plej bona patrino, de kiam subite.. (*interrompas kaj rigardas mirigite Makrinan*).

MAKRINA (*enpense*). Ho, tio ne okazis subite. Mi cin dorlotis, flegis kiel pupilon de l'okulo, mi estis por ci tia, ke patrino ne povus esti pli bona por sia propra infano.

BRONKA. De lulilo ci min vartis... kaj kiam mi estis tia malgranda, malgrandeta ci min nutris per cia lakto—ci scias, Makrina, ci tute ne maljuniĝis kaj ci estas same trankvila, bona kaj milda.

MAKRINA (*balancas la kapon*). Trankvila, bona kaj milda.

BRONKA. Makrina ĉu ci memoras, kiel zorge ci elprenadis min el la lulilo, kiam mi estis mal-kvieta, kaj tutan nokton ci paŝis kun mi tra la ĉambro, kaj ĉirkaŭprenis min kaj varmigis.

MAKRINA. Mi memoras cin antaŭ, ol mi cin en lulilon metis.

BRONKA (*subite*). Kion ci diras?

MAKRINA (*trankvile*). Mi konis cin antaŭ, o ci naskiĝis. Mi cin ĉirkaŭprenis, karesis, kisis, por cin vivigi (*enpense*). Nun mi venas, por la palpelojn, kiujn mi per mia kiso al vivo vekis, fermi, fermi... nur ne per kiso, sed per tiuj ĉi fingroj...

BRONKA (*saltleviĝas*). Ĉu mi sonĝas?

MAKRINA. Ĉu ci sonĝas? Kaj kio estas la vivo? Sonĝo en sonĝo... La sama lumo de iu stelo, kiu cin vekis al vivo, migras, migras vage kaj nekonante sian sorton nek la sorton de l'homoj, kiujn ĝi benis, kiam ili naskiĝis, kaj poste revenas post multaj jaroj, por detru la vivon, kiun ĝi kreis.

BRONKA (*iras malrapide al sonorilo*).

MAKRINA (*kun rideto*). Kial ci min timas? Ci volas alvoki ciajn lakeojn. Eble ci volas min forpeli de ĉi tie?.. (*kaptas Bronkan je la mano*)

BRONKA (*terurita*). Kia malvarma estas cia mano, kia malvarma...

MAKRINA (*rigardas ŝin kore*). Bronka, ci



nun tre rememorigias al mi cian patron... Li sidis tiam en sia laborejo, kaj subite, kvazaŭ tondro lin trafus, saltleviĝis...

BRONKA. Kial li saltleviĝis?

MAKRINA. Cia fratino sin dronigis...

BRONKA. Kio? kio? kio?

MAKRINA Cia fratino sin dronigis. Mi mem eltrenis ŝin el lageto tute sama, kiel la via, tiu antaŭ fenestroj. Mi prenis sur brakojn la malfeliĉan kadavreton. mi ĝin karesis, varmigis, ĉirkaŭprenis, kis-sis—nenio helpis... Mi estis vekinta ŝin al vivo per la kiso, kaj la mortajn palpebrojn mi fermis per miaj fingroj... Cia patro staris sur la sojlo de l'verando, kvazaŭ ŝtona kolono, ci kuŝis kun la vizaĝo kaŝita en la herbo, kiam mi paŝis apud ci kun mia kara ŝarĝaĵo.

BRONKA (*rigardas Makrinan duonsenkon-scie*). Makrina, ŝajnas al mi, ke mi estas malsana, mi ne komprenas tion, kion ci diras. Ci vekis al vivo per cia kiso min kaj mian fratinnon por fermi poste niajn palpebrojn per malvarmaj fingroj? Ci ja tiel diris? Ĉu ne vere? Kaj poste ci diris, ke ekzistas tiaj steloj, kiuj vekas homojn al vivo, migras pluen sur la vojo de malluma sorto kaj revenas denove, por detru la vivon kreitan per ilia propra lumo? Tiel ci diris? Ah, kiajn belajn fabelojn ci rakontas... Oh, rakontu al mi ankoraŭ tiun; atendu—atendu... kiel strange dormema mi estas... Vere!

ekzistas tiaj steloj, kiuj altiras, trenas, ŝiras la homon; oni devas ilin sekvi supren al ĉielo, malsupren al infero; laŭlarĝe sur ĉiuj oceanoj, sed oni devas ilin sekvi, oni devas... (*alpremas sin al Makrina*). Li sekvis sian stelon, kaj mi, Makrina, mi restis sola; ci ja prenos min sur la brakojn kaj portos min en la ĉirkaŭprenoj, per meti min ĉe la piedoj de mia patro. La fratinnon mi revidos... la patrinnon mi revidos... Makrina, ci estas tia trankvila, kaj bona, kaj milda... Oh, kia dormema mi estas... Sidu apud mi Makrina... (*Ŝi ŝanceliĝas, kuŝiĝas sur la tapiŝo. Fermas la okulojn*).

MAKRINA (*maltaŭte leviĝas, rigardas ŝin, poste serioze eliras el la ĉambro*).

(*Momento de profunda silento, Bronka ŝajnas dormi, eniras Kazimiro, aliras al Bronka*).

## SCENO V.

KAZIMIRO. Bronka, kio kun ci fariĝas?

BRONKA (*kvazaŭ vekita el dormo*). Oh, Kazjo, Kazjo, kiel bone estas, ke ci venis.

KAZIMIRO. Bronjo, ĉu ci dormis?

BRONKA. Mi ne scias, mi ne scias, mi ne scias. Mia kapo estas tia peza, kaj mi tia sola, sola. Tadeo foriris kun Eva arbaron, kaj mi restis sola. Kazjo, kial mi estas tia sola?

KAZIMIRO (*kun timo*). Makrina estis ja kun ci ĉi tie?

BRONKA (*frotante la okulojn kaj la tem-  
piojn*). Makrina? Kion ci diras? Makrina? Mi son-  
ĝis pri Makrina, mi sonĝis pri mia patrino... Kazjo,  
Kazjo, pri mia patrino mi sonĝis! Ci scias, estis  
tiel: mi iris, iris, iris tra ia malplena dekliva kampo.  
Ĉirkaŭe en griza krepusko vidiĝas nur krucoj, kaj  
subite, sur la vojo, sidas ia virino; mi nenion vidis  
nek aŭdis, mi nur sentis, ke tie sidas mia patrino  
kaj alprenas al la brusto unu mortintan infanon.  
Ha—ha—ha! Kazjo, kial ci estas tia terurita? Aŭs-  
kultu—kaj ŝi rigardas, kiel la alia infano vagas per  
nudaj piedoj sur la dornaj vojetoj... kun peno su-  
pren, supren. Kaj tiel mi iras kaj iras, kvazaŭ iu  
min trenus antaŭen. Kaj subite mia patrino forlasas  
la infanon, kiun ŝi ĉirkaŭprenis kaj etendas al mi  
la brakojn, kaj mi jam morte lacigita jetas min al  
brusto de l'patrino... subite, subite kvazaŭ vento for-  
blorus de ŝi nebulan kovrilon, kaj mi kuŝas en te-  
rura fera ĉirkaŭpreno de kadavraj ostoj... Ho!..

KAZIMIRO. Bronjo, Bronjo, ci estas malsana.

BRONKA. Ha... ha... ha... malsana, malsana.  
Kion signifas esti malsana?! (*Ŝi rigardas Kazimi-  
ron longe, kaj poste diras mistere*). Kazjo, Kazjo,  
ci diris al mi hodiaŭ matene, ke ci min amas. Ĉu  
mi sonĝis, aŭ efektive estas vero, ke ci diris, ke ci  
min amas?

KAZIMIRO. Jes, jes, mi diris kaj ankoraŭ unu  
fojon mi al ci ripetas, ke mi cin amas.

BRONKA. Ah, kiel bone estas, ke ci min  
amas. Ci ne forlasos min, Kazjo? Ĉu ne vere?

KAZIMIRO. Ne.

BRONKA. Kaj ĉu ci scias, kial Tadeo min  
forlasis?

KAZIMIRO. Mi scias.

BRONKA. Mi ankaŭ scias. Ĉu ne vere, Ka-  
zjo, ja tiel?

KAZIMIRO. Kio?

BRONKA. Mi estis la neĝo, tia bona, blanka  
neĝo, kiu kovras la malfeliĉan teron, varmigas ĝin,  
ĉu ne vere, Kazjo?

KAZIMIRO (*enpense*). Jes... Aŭ eble ci estis  
bona, kvietiga mano, kiu donis rifuĝon al iu vundita  
birdo... tre bone estis al ĝi ĉe ci, dum ĝi estis mal-  
sana, sed nun novaj plumoj elkreskis sur ĝiaj flugi-  
loj,—la muskoloj plifortiĝis, kaj ĝi sin pretigas al  
flugo... ĝi ne bezonas sin pretigi, ĉar ĝi jam skuis  
siajnflugilojn...

BRONKA (*terurita*). Ne diru tion, ne diru!

KAZIMIRO (*iritita*). Jen ĝuste mi parolos pri  
tio. Tadeo forflugos de ci kun Eva.

BRONKA. Kun Eva? Kun Eva? Kiu estas Eva?  
Kio ŝi estas?

KAZIMIRO. Kiu ŝi estas? kio ŝi estas? Mia  
sonĝo, cia inkubo dolora, kaj infera dezirego de

Tadeo. Jen kio estas Eva (*li ridetas*). Ankoraŭ ci ne komprenas? Aŭskultu do: Eva estas mia sonĝo, ĉar mi ŝin bezonis por cin ekvidi en tuta cia forto kaj beleco. Por ci Eva estas timo kaj teruro, ĉar ci sentas, ke ŝi kondukas cin en la nigran abismon de malespero, ci sentas, ke ŝi farabas de ci Tadeon, por kiu ŝi estas infera dezirego de ia granda forto kaj potenco, ŝi estas la malkvietiga sopiro, kiu ĉiam lin altiris supren—supren al ĉielo.

BRONKA (*saltlevigas kaj rektigas*). Rigardu, mi estas forta, mi estas sufiĉe forta kaj malvarma, por lin kaj ŝin detruu, pieddispremi! Mi estas pli forta ol ili ĉiuj. Mi disŝiros kaj mortigos ŝin, ĉar mi estas sola, sola lia sopiro!

KAZIMIRO. Lia sopiro iris for de ci.

BRONKA (*freneze*). Sed, Kazjo, rigardu min, rigardu! Vidu, mi ankaŭ estas juna, bela... tutan eternon li ripetadis al mi: kia bela ci estas. Kial lia sopiro devas iri for de mi?

KAZIMIRO (*prenas ŝiajn manojn kaj parolas mallaŭte kaj milde*). Por mi ci estas bela, ci estas granda kaj sankta kvietigo por mi...

BRONKA (*rigardas lin, kaj poste subite*). Ci min tentas?

KAZIMIRO. Ne, Bronka, ne, jam hodiaŭ matene mi diris al ci, ke mi cin malestimus, se ci amus min reciproke, sed mi cin amas tian belan, kia ci estas en tuta cia senforto kaj malespero... Io

malbona okazas en ĉi tiu domo, kaj mi volas esti cia frato, amiko, kion ci volas...

BRONKA. Kazjo, ĉu ci veron diras?

KAZIMIRO. Ĉu ci ne sufiĉe ankoraŭ min konas?

BRONKA (*kareas lin*). Mi konas cin, Kazjo, konas. Mi tute sola en la mondo, kaj ci tute sola... mi ne amas cin, sed mi amas cian bonan, belan amon. Diru al mi, Kazjo, kion signifas, ke mi estas tia dormema, lacigita?

KAZIMIRO (*senteme*). Tutan nokton ci ne dormis.

BRONKA. Oh, kiel mi lin turmentis, kaj kiel li min turmentis.

KAZIMIRO. Kion li diris al ci?

BRONKA. Nenion, nenion. Li estis bona, dolĉa, amata, nur mi ekkomprenis, ke lia sopiro foriris malproksimen de mi (*subite kun ekkrio*). Kazjo, kie estas Tadeo?

KAZIMIRO. Li foriris kun Eva en la arbaron.

BRONKA (*subite enpense*). Tra arbaroj, trans montojn, trans oceanojn kaj trans Bronkan, trans tiun solan, amegatan Bronkan, kaj nun tian forlasitan Bronkan, kien? kien?

KAZIMIRO (*kareas al ŝi la manojn*). Mi ne scias.

BRONKA. Kazjo, Kazjo, ĉu mi songis, sed ŝajnas al mi, ke Makrina estis ĉi tie?

KAZIMIRO. Mi renkontis ŝin en la koridoro.

BRONKA. Je-e-s? Ci ŝin renkontis?.. Diru, kiu ci estas?

KAZIMIRO (*ridetas mistere*). Ha... Eble frato de Makrina, ĉar neniu cin tiel amis nek amas, kiel Makrina kaj mi.

BRONKA Vere, vere.

KAZIMIRO. Vere, de malproksime venis al ci Makrina, de malproksime venis mi al ci, por diri, ke mi cin amas...

(*Silento*).

BRONKA. Jes, jes, ci kaj Makrina.

#### SCENO VI.

(*Lakeo eniras*).

LAKEO. Sinjorino, la neĝo estas forbalaita.

BRONKA. Oh, mi estas tre dankema al ci por tio... Ĉu la truoj en la glacio estas elhakitaj?

LAKEO. Jes.

BRONKA. Ĉu ci ordonis alvoki fiŝkaptistojn?

LAKEO. Jes.

BRONKA. Ĉu torĉoj estas pretigitaj?

LAKEO. Jes, sinjorino.

BRONKA. Mi dankas. Ci povas foriri.

(*Lakeo eliras*).

#### SCENO VII.

KAZIMIRO. Kion signifas tio ĉi?

BRONKA. Nenion signifas, mi iros al fiŝkaptado... (*esploreme*). Kazjo, ĉu ci iros kun mi?

KAZIMIRO. Mi iros, kien ajn ci volas.

(*Silento*).

BRONKA (*subite gajiĝas*). Ĉu ci memoras nian mirindan promenadon sur la lago hieraŭ kaj antaŭhieraŭ?

KAZIMIRO (*enpense kaj rigardante malproksimon*). Mi memoras.

BRONKA (*rapide, poste ĉiam pli malrapide*). Kial ci tiel subite enpeniĝis kaj tiel fikse rigardas la bluan malproksimon de la neĝo, la nigrajn kampojn, sur kiuj ekĝermos la verda greno, kiam la neĝo malaperos...

KAZIMIRO (*kvazaŭ efte*). Kiam la neĝo malaperos...

BRONKA. Kazjo, ĉu ci miu efektive amas?

KAZIMIRO. Mi amas!

BRONKA. Sed ci scias, ke mi nur Tadeon amas?

KAZIMIRO. Mi scias.

BRONKA. Kaj ci estas tiom bela, ke ci min malestimus, se mi amus cin reciproke?

KAZIMIRO. Jes, mi cin malestimus, se ci eĉ nur per unu movo montrus al mi cian amon.

BRONKA. Kaj se mi cin tre, tre petus pri io, ĉu ci estas kapabla tion plenumi?

KAZIMIRO. Kion?

BRONKA (*esploreme*). Eĉ tion?

(*Momento de silento, ili longe rigardas unu la alian*).

KAZIMIRO (*enpense*). Ĉion, ĉion.

BRONKA (*subite*). Kie estas la glitiloj.

KAZIMIRO. Por kio la glitiloj.

BRONKA. Por preteksto, por preteksto...

KAZIMIRO. Bone. Kiel ci volas.

BRONKA. Ĝi fariĝu.

KAZIMIRO. Hm. Ĝi fariĝu.

BRONKA (*teruregita*). Ĝi devas fariĝi?

KAZIMIRO. Jes! (*ridetas*). Sed por kio ci ordonis alvoki la fiŝkaptistojn? Por kio homoj? torĉoj?

BRONKA (*rigardas Kazimiron*). Vere, vere, Oni jas povas fari ĉion tiel, ke neniu scios. Ha, ha ha, kia stulta elpenso! Ili povus ankoraŭ en lasta momento savi nin—ha, ha, ha,—kian malsaĝan komedion diktis al mi mia dolora koro... (*ŝi sono! rigas*).

### SCENO VIII.

(*Lakeo eniras*).

LAKEO. Kion vi ordonos, Sinjorino?

BRONKA. Diru, ke hodiaŭ ne estos fiŝkaptado. Morgaŭ matene — morgaŭ matene — ci komprenas?

LAKEO (*mirigita*). Sed jam ĉio estas pretigita.

BRONKA. Tre bone. Sed nur morgaŭ matene okazos la kaptado de fiŝoj — ha, ha, de neordinaraj fiŝoj...

LAKEO. Do la torĉoj estas superflujaj?

BRONKA. Ĉu ci ankoraŭ ne komprenis min?

LAKEO. Mi kompreneblas, sinjorino, sed la lago estas jam balaita.

BRONKA. Tre bone.

LAKEO. La glacitruoj estas elhakitaj.

BRONKA. Ankoraŭ pli bone.

LAKEO. Do repreni la ordonon?

BRONKA. Mi ja milfoje jam tion al ci diris.

(*Lakeo kliniĝas kaj eliras*),

### SCENO IX.

KAZIMIRO. Ni iru do!

BRONKA. Ni iru—Al ci estas ja tute egale ĉu tie ĉi aŭ tie ci enuos? (*ŝi ridas histerie*).

KAZIMIRO. Absolute—nu kaj cetere per mia persono mi donos tre bonan ŝajnigon de stranga aŭ pliĝuste de tre ordinara akcidento, ke du homoj enfalis en la glacibreĉon (*Ili ridas*).

KAZIMIRO. Ni ne bezonas eĉ skribi testamenton...

BRONKA (*pretigas sin nerve*). Ha, ha, ha—sen testamento, sen testamento... Ĉu ci jam estas preta?

KAZIMIRO. Jam de longe.

BRONKA. Ni iru, ni iru... (*ŝi ĉirkaŭrigardas, adiaŭas la ĉambron per rigardo,—ili eliras*).

### SCENO X.

(*Scenejo estas dum momento malplena. Eniras Makrina, rigardas en ĉiujn flankojn*).

MAKRINA. Ili foriris... Mia rikolto... mia rikolto... unu mi portis en miaj brakoj... kaj nun la duan... la duan... (*Aliras al la tapiŝo, ĉirkaŭirante malrapide la ĉambron*). Tie ĉi sidis mia amata blanka kolombeto... tie ĉi... Kaj ŝin mi plej multe amis... (*Ĉirkaŭiras plu la ĉambron, laŭvice tuŝas la meblojn*). Jen... tie ĉi mia kolombino kaŝis siajn larmojn (*aliras al la fotelo*). Tie ĉi ankoraŭ hodiaŭ matene sidis Bronka... Bronka... Bronka... Kaj ŝi jam ne revenos, ne revenos... Tiel devis fariĝi—La blanka fantomo de ŝia patrino vagas en la palacoj kaj vokas... vokas... Ili jam ne revenos, neniam plu ili revenos... Kaj nun mi restos tie ĉi... (*Sidiĝas kaj restas senmova*).

Fino de la dramo.